

7-8

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA
ESPERANTISTA ASOCIO

JULIO - AŬGUSTO 1962



E N H A V O

	Pago
* * * Brila kaj sukcesplena kongreso	1
N. Nanov. 35-a Bulgara Esperantista Kongreso en Burgas	3
Rezolucio de la 35-a Kongreso de la bulgaraj esperantistoj . . .	10
Изменения в устава на БЕС	11
Junulara kunveno en la kadroj de la 35-a Kongreso de BEA en Burgas	12
V. Oljauov. Por la paco kaj la amikeco	14
Filippo Franceschi. Neforgeseblaj tagoj	16
D-ro Stefan Kadiev. La poŝtmarko	17
At. D. Atanasov-Ada. Miaj amikoj (naŭa leciono de la kurso por perfektiĝo)	18
* * * Grava novaĵo el Greklando	19
Ivan Burin. Zorgoj ĉiutagaj. Trad. C. Murgin	20
Asen Grigorov. Aviadiloj	20
Zora Mladenova-Hans. Kaj tiam	21
Milda Jakubcova. Viktimoj de modo	22
Rosica Georgieva. Revo	23
Metodi Pančev. Pri la Esperanto-bulgara vortaro	24
* * * 75 jaroj da Esperanto-movado	26
N. N. Sesa Nacia Kongreso de la paco	27
P. Ĉakova-Georgieva. Provleciono dediĉita al Jurij Alekseviĉ Ga- garin, la unua kosmonaŭto en la mondo	28
Inĝ. Azarij Perelman. Siberio	30
ORGANIZA VIVO	31
Nia konkurso	

*Abonkotizo : jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2 lv,
2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSR, Hungario, Jugoslavio,
Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv.*

*Reklamtarifo : 0,15 levoj por cm²; korespondanconcoj : 5 stotinkoj por ĉiu
vorto. Eksterlandaj adresoj publikigataj senpage. Ekstera kovrilpago — 60 lv.*

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa,
Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6,
Padova

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang
P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23-
Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Sep-
tembrie 65, București 5

SOVETUNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54
kv. 19, Moskva, B—162

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



BRILA KAJ SUKCESPLENA KONGRESO

La 35-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj okazinta de la 14-a ĝis la 16-a de julio en la belega urbo Burgas estis nova, brila manifestacio de la impeta marŝo de la enlanda movado. Pli ol 1 800 delegitoj kaj gastoj de la tuta lando venis ĉe la plensuna bordo de Nigra Maro por partopreni la laboron de tiu vere impona kongreso. Neniam en la historio de la bulgara Esperanto-movado alia kongreso estis tiel multnombre vizitita.

Malnovaj kaj maljunaj Esperanto-pioniroj, mezaĝaj nelacigeblaj aktivuloj kaj ĝojplenaj entuziasmaj gejunuloj el ĉiuj anguloj de nia belega patrio amase kolektiĝis en la kongresurbo por pridiskuti la aktualajn problemojn de la movado. La kongreson partoprenis ankaŭ kvindekda eksterlandaj esperantistoj el 11 eŭropaj socialistaj kaj kapitalistaj landoj. Tiu ĉi signifoplena fakto donis al la kongreso vere internacian karakteron kaj nerefuteble montris la eblecojn pri praktika amikeca kunlaboro per Esperanto por la interproksimiĝo de diverslandaj esperantistoj. Ĝi montris ankaŭ, ke oni povos sukcese utiligi la naciajn Esperanto-kongresojn por helpi la efektivigon de la granda problemo por daŭra paca kunekzistado de ĉiuj popoloj. Certe la internacia lingvo estas neanstataŭigebla ilo por la realigo de tiu celo, se ĝi estos sisteme kaj celkonforme utiligata tiudirekten.

La ĉefa kaj la esenca parto de la tuta kongreslaboro estis la raporto de CK de BEA dum la periodo de la 34-a Kongreso ĝis la 35-a kaj la diskutoj pri la starigitaj en ĝi problemoj. Oni emfazis, ke dum tiu periodo la Centra Komitato faris ĉion eblan kaj necesan por la ĉiufanka plibonigo de la agado de la Asocio kaj la aktivecoj de la lokaj societoj. En rezulto de la bone plenumita propaganda, kulturkleriga, ideologia kaj organiza laboro plimultiĝis la nombro de la societoj kaj ties membraro, pliaktivigis la societa vivo, plialtiĝis la disciplino kaj la lingva nivelo de la esperantistoj. Nun Bulgara Esperantista Asocio nombras pli ol 5 000 regulaj membroj. Ĝi fariĝis unu el la plej amasaj naciaj Esperanto-organizaĵoj en la mondo kun gloraj tradicioj kaj brila promesplena estonteco.

La diskutado, kiun partoprenis pli ol 35 delegitoj, montris la ĉiufankan agadon de la societoj, ties atingajoj kaj mankoj. Estis interŝanĝita pozitiva

sperto pri varbado de novaj membroj, pri la instruado de la lingvo en la kursoj, pri la internacia kolektiva kaj individua korespondado kaj pri vico da aliaj demandoj el la vivo de la societoj. Multaj parolintoj akcentis la partoprenon de la esperantistoj en la laboriniciatoj de la Patrolanda Fronto, kio sendube helpis por la plifirmigo de la aŭtoritato de la lokaj societoj kaj ties socia rekono. Tio kontribuis ankaŭ por la penetro de Esperanto en la popolamasojn konstruantojn de la socialisma sociordo, kiuj havas pozitivan rilaton al nia lingvo. Tie ĉi, sendube, kuŝas unu el la plej gravaj stimuloj por la sukcesoj de nia enlanda movado.

Surbaze de la farita diskutado la Kongreso aprobis multajn entreprenojn, kiuj trovis lokon en la kongresa rezolucio. Estis decidite honore al la 48-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Sofio en 1963, la nombro de la asociaj membroj pliiĝu de 5000 al 6000. Krome, oni decidis daŭrigi la klopodojn por plua plibonigo de la organiza kaj kulturkleriga laboro, plivastigi la kolektivajn internacian korespondadon ktp. Speciale estis substrekitaj la urĝa neceseco pri pli ofta okazigo de kursoj por preparo kaj repreparo de lektoroj de Esperanto kaj organizo de ekzamenoj por lingvoscio kaj instrukapablo. Aparte oni atentigis pri sukcesaj klopodoj antaŭ la koncernaj organoj pri enkonduko de Esperanto en la studrondetojn de la lernejoj kaj la altlernejoj, kiel paŝo por enkonduko de la lingvo kiel lernobjekton en la lernejoj. Por tio en nia lando estas favoraj kondiĉoj.

Konsiderante la gravecon de Universala Esperanto-Asocio kiel sola reprezenta internacia organizaĵo de la Esperanto-movado, oni emfazis, ke ankaŭ estonte Bulgara Esperantista Asocio ankoraŭ pli intime laboros en ĝiaj kadroj por la efektivigo de ties celo sur internacia kampo. En ligo kun tio ni devas menci, ke Bulgara Esperantista Asocio kaj ĉiuj bulgaraj esperantistoj restas kaj ĉiam restos fidelaj al la fundamentaj principoj de Zamenhofa Esperanto kaj batalos por la konservo de la lingva unueco en la movado. Ni respektu rigore la Fundamenton kaj la genian lingvon de Zamenhof, kiu dank'al siaj kvalitoj venkis kaj supervivis ĉiujn aliajn projektojn pri internacia helpa lingvo. Ĝi jam fariĝas la dua lingvo de larĝaj popolaj tavoloj en la tuta mondo.

La tuta laboro de la 35-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj montris, kian grandan forton povus prezenti nacia Esperanto-movado, se ĝi ĝuste solvos la anticipe fiksitaĵajn taskojn, se ĝi intime ligiĝas kun la vastaj laborulaj amasoj kaj se ĝi sincere plenumus sian internacian devon.

Nome tio donas rajton al ĉiuj bulgaraj esperantistoj fieri pro la grava evento en 1963 — la organizo de la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio, la ĉefurbo de nia popola respubliko. Kaj ni esperas, ke la bulgaraj esperantistoj digne plenumos tiun honoran devon.

Al senĉesa laboro por pluaj sukcesoj de la enlanda kaj internacia Esperanto-movado, por paca kunekzistado de la popoloj.

35-a BULGARA ESPERANTISTA KONGRESO

Sofia stacidomo. Lasta antaŭkongresa tago. Desur la dommuroj kvazaŭ invitante ridetas la antaŭkongresaj afiŝoj. La vagonaro etendigante proponas al la kongresanoj siajn lokojn. Ĝi estas ornamita per verdstelaj grandaj kaj malgrandaj flirtantaj esperantaj standardoj. Du vagonoj estas speciale rezervitaj por la kongresanoj. Preter la vagonaro svarmas esperanta popolo — unuj estas veturontoj kaj aliaj estas adiŭantoj. Ĉiuj estas gajaj, ĝojaj. La horo jam estas oka. Post kelkaj pezaj kaj fortaj elspiroj la vagonaro signalelfafas kaj ekiras orienten. La ĝojokrioj kaj salutoj pligrandigas, el la fenestroj de la vagonaro kaj el la stacidomo etenditaj manoj per poŝtukoj kaj flagetoj salutas la disigantojn.

Antaŭas la vagonaro trapasante grandajn kaj malgrandajn apudbalkanajn urbojn kaj vilaĝojn. De tempo al tempo ĝi haltas ĉe la stacidomoj kvazaŭ intence por envagonigi novajn kongresanojn. En la kupeoj regas gajeco kaj babilemo. Plej multe ĝi estas en la kupeoj de la fremlandaj gastoj-esperantistoj. Ĉiu rapidas interkonatiĝi, interŝangi esperantan parolon, demandi pri siaj fremdlandaj amikoj, konatuloj.

Vesperigas. Ni atingas la stacidomon de Burgas. Kelkcentoj da kongresanoj elvagoniĝas. Renkonte al ili venas amaso da burgasanoj kamaradoj-esperantistoj. Multaj inter ili estas kun verdaj rubandoj sur la brako. Denove ridoj, salutoj, bonvenigoj. La loka kongreskomitato postenas. Tuj estas kontrolataj la kongres-kartoj de la delegitoj kaj gastoj. Denove flirtas jam ne unu, ne du, sed multaj verdstelaj standardoj. La urbo estas solene ornamita per standardoj, afiŝoj, sloganoj kaj verdaj superstrataj sloganoj bonvenigantaj la kongresanojn. Ĉiuj estas disdividitaj por loĝado. Ili ja devas ripozi por la morgaŭa kongres-tago.

Dekvaran de julio — vespere. Laŭ programo la kongreso devas esti inaŭgurita en la apudmara somera teatro. De ĉiuj stratoj kvazaŭ torente alvenas centoj da delegitoj kaj gastoj por la inaŭguro de la kongreso. Jam mankas lokoj. Ja la kongresanoj estas ĉirkaŭ 1700. En la prezidantaro estis elektitaj jenaj personoj: Valčo Minev — prezidanto de la urba konsilantaro en Burgas, Hristo Gorov — prezidanto de BEA, Atanas Lakov — vicprezidanto de BEA, V. Oljanov — sekretario de BEA, la membroj de CK de BEA — Ivan Keremidčiev, Ivan Sarafov, Trajna Petkova, Dimitr Dojčev, Simeon Simeonov, Krâstjo Karucin, la membroj de CK Radoslav Tričkov el Vraca, Irina Ĉukova el St. Zagora kaj Boris Drenski el St. Dimitrov, la veteranoj de nia movado — Dimitr Malčev kaj Ivan Ŝivarov el Plovdiv, Zora Hans el Varna, Boris Golemanov — vicprezidanto de LKK en Burgas kaj la junaj geaktivuloj Donka Petkova el Loveč kaj Dimitr Ivanov el Plovdiv. En la prezidantaron eniris la fremdlandaj gastoj: Rudolf Burmaj-ter el GDR, Branko Maksimovič el Jugoslavio, Jan Toma el Francio, Rju kaj Katrin, Bosong el Nederlando, Hilda Tuman el Aŭstrio, Mejta Knudsen kaj Holger Jensen el Danio, Irena Skorupa el Pollando, Zigmund Papp kaj Istvan Nagi el Hungario, Aldo Formagio kaj Filipo Franĉeski el Italio.

La scenejo estas ornamita per bonveniga slogano al la kongresanoj. Impone, solene desur la sceneja muro rigardas la portreto de nia majstro, genia kreinto de internacia lingvo Esperanto D-ro Ludoviko Zamenhof. Ĉe la tribuno ekstaras la vicprezidanto de la loka kongresa komitato Boris Golemanov. Per mallonga, sed impona salutprolodo li malfermas la kongreson.

En la nomo de la urbanejoj de Burgas la kongresanoj estis salutitaj de la

prezidanto de la Urba Konsilantaro kaj prezidanto de la loka kongresa komitato Vălčo Minev. La kongreson ankaŭ salutis k-do Kiril Klisurski en la nomo de la Nacia Konsilantaro de la Patrolanda fronto; de Centra Komitato de la Komunista Junulara Asocio; de reprezentanto de la Ministerio de Klerigo kaj Kulturo; de la Asocio de la Bulgaraj Ĵurnalistoj; de la Komitato de Bulgaraj Virinoj k. a.

La kongreso estis salutita ankaŭ de fremlandaj gastoj-esperantistoj: Zigmund Pap de Hungario, Branko Maksimović — Jugoslavio, Aldo Formaggio — Italio, Karlo Akselson — Svedio k. a.

Neatendite en tiu momento eksonas fanfaroj. Ambaŭflanke de la grandega kunveno montriĝis vicoj da standardoj portataj de junaj pioniroj. La momento estas solena, majesta. La kunveno kvaŝaŭ ĉesas spiri kaj subite eksplodas aplaŭdoj. Sur la scenejo, antaŭ la prezidanto de la kunveno ekstaras kun levita mano lernanto — „pioniro“ kaj per forta voĉo petas:

— Kamarado prezidanto, permesu, al grupo da pioniroj saluti la 35-an bul-

garan esperantistan kongreson.

— Mi permesas — respondas la prezidanto.

Postmomente antaŭ la prezidantaro ekstaras juna pionirino kaj per klara, forta kaj pure esperanta lingvo en la nomo de la pioniroj salutas la kongreson dezirante fruktodonan laboron al la kongreso. Post tio estas disdonitaj bukedoj de floroj al ĉiu el la prezidantaro. Denove flirtado de pioniraj standardoj kaj sonado de fanfaroj.

Fine en la nomo de la kongreso estis sendita salut-telegramo al la Tutmonda kongreso por senarmado kaj paco en Moskvo, per kiu la bulgaraj esperantistoj plenkore subtenas la proponojn de N. S. Ĥruŝčov por ĝenerala kaj totala senarmado.

Post la inaŭgura kunveno en la luksa restoracio „Primorec“ okazis interkonatiga vespero, en kiu la kongresanoj ĝis malfrua nokto pasigis en amikeca kaj agrabla atmosfero.

La sekvantan tagon, dekvinan de julio, oni komencis la unuan laborkunsidon. La prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio Ĥristo Gorov legis

LA RAPORTON DE CK

La periodo post la 34-a kongreso en Târnovo estas tre mallonga, sed ĝi enhavas tre gravajn eventojn. Dum tiuj du jaroj la tutmonda socialisma sistemo stabiligis, ankoraŭ pli impete kreskis kaj fortikiĝis la vivo-forto de la socialismo, kion atestis la historia 22-a Kongreso da la Komunista Partio de Sovetunio.

La bulgaraj esperantistoj konsideras, ke Esperanto estas kreita por detrui la murojn de malamo kaj suspekto inter la popoloj, helpi por starigi pacon inter la popoloj. Ili batalas por paco kaj estonte laŭtigossian voĉon en defendo de la paco. Ili estas feliĉaj, ke ili vivas kaj laboras en socialisma lando, kiu entute dediĉis sin al paca laboro, kie la socialismo venkis definitive kaj

por ĉiam. La esperantistoj estas nedisigibla parto de sia popolo kaj modeste kontribuas en la grandiozaj sukcesoj de nia popolo.

La kultura fronto, en kiu ni laboras, starigis antaŭ la ĝisnuna estraro de la asocio kiel centran ideopolitikan taskon klarigi la rolon de la internacia lingvo kaj ĝian uzadon, por ke estu popularigitaj la sukcesoj kaj la atingajoj de nia patrolando kaj la batalo por konservado de la paco.

Por la ideopolitika edukado de la esperantistoj dum la raportata periodo estas tradukitaj kaj eldonitaj kelkaj libroj: Intervjuoj kaj paroladoj de k-do T. Ĵivkov, broŝuro kun eldiroj de k-do Anton Jugov, „Elektitaj versaĵoj“ de N. J. Vapcarov, kolekto da rakon-

toj de klasikaj kaj nuntempaj aŭtoroj — „Bulgara prozo“ kaj libro pri la kultura progreso de Bulgario. Baldaŭ aperos biografia skizo pri Georgi Dimitrov.

Kiel grava rimedo por la manifestiĝo de la organiza stato kaj agado de Bulgara Esperantista Asocio servas la organo de BEA „Bulgara Esperantisto“, kies enhavo kaj teknika formado dum la raportata periodo estis konsiderinde plibonigitaj. En ĝi estis traktataj demandoj kaj problemoj pri la internacia lingvo en la lumo de la marksisma mondkoncepto.

Gravan taskon ludis kaj ludas „Internacia Ĵurnalistoj“, „Nuntempa Bulgario“, „Bulgara filmo“ kiuj aperas ĉe ni. La gazeto „Nuntempa Bulgario“ varbis amikojn de Bulgario en pli ol 50 landoj. Tio estas videbla el la ricevitaĵoj dum la pasinta jaro 5000 leteroj el eks-terlando.

Dum la raportata periodo estis organizitaj multaj kursoj en la tuta lando. Krom kursoj por urbanoj, tiaj estis malfermitaj en la superaj lernejoj en Sofio kaj Varna, en la anglalingva gimnazio en Sofio, en la mezaj politeknikaĵoj kaj la fakaj lernejoj en Peŝtera, Pazarĝik, Varna, Kolarovgrad, Mezdra, Sevlievo, Stara Zagora kaj en multaj aliaj lokoj. Estis organizitaj ankaŭ kursoj por kursgvidantoj en la tendaro Drujevo kaj aliloke. Oni rekomendas organizi en Sofio seminarion por la kursgvidantoj en la lernejoj.

Por kontentigi la bezonon pri lernolibroj bone verkitaĵoj en metoda rilato, oni organizis en 1961 konkurson por verko de lernolibro. Konkursis 9 projektoj, kiujn recenzis kvarmembra komisiono. Tasko de la nova Centra Komitato estas rapidigi la eldonadon de kelkaj bonaj lernolibroj. Dum la sekvonta jaro oni eldonos esperanto-bulgaran vortaron, esperantan gramatikon kaj aliajn esperantajn helpilojn.

Bulgara Esperantista Asocio prezentas sin en la 35-a Esperanto-kongreso per 130 esperanto-societoj kun pli ol

5000 membroj. Tio estas solida cifero, kiu pravas, ke sukcese plenumiĝas la tasko pri la plinombriĝo de la asocio. Per siaj societoj la asocio havas eblecon pligrandigi la nombron de la membroj. Oni starigas la taskon honore al la 48-a Universala Esperanto-kongreso fari ĉion eblan por atingi la nombron de 6000 membroj.

Senĉese enfluas junaj esperantistoj en la esperantista movado. Per ellerno de Esperanto nia socialisma junularo povas doni socialistan sencon de sia vivo, suprenlevi sian kulturen nivelon, ĉar Esperanto estas fenestro al la mondo. Dum la trapasita periodo estas kreitaj multaj gejunulaj esperantistaj grupoj nombrantaj pli ol 300 junulojn. Dekoj da gejunuloj korespondas kun alilandaj esperantistoj, precipe ĝenerantoj, utiligante la korespondadon en sia lernado.

En la raporto de la prezidanto estis pritraktitaj ankaŭ la diversaj sekcioj ĉe la asocio: Instruista, fervojista, kuracista, tramista kaj aliaj. Estis interesa la agado de la instruista sekcio. Ĝi ellaboris novan proponon pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. La Supera Instru-Konsilantaro de la Respubliko akceptis la proponon de la Sekcio. Tamen la decido ne estis aprobita de la tiama ministro de la klerigo V. Ĉervenkov. Oni insistas, ke estas necese renovigi la proponon. Gravan rolon plenumas la sekcio de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Ĝi plibonigis kaj plivastigis sian agadon. La estraro de la sekcio kontaktiĝas kun la komitato de MEM kaj prizorgas plivastigon de ties organo „Paco“ en la lando. La sekcio de la Tutmonda Asocio de la Esperantistoj-Ĵurnalistoj ankaŭ ludas gravan rolon per sia organo „Internacia Ĵurnalistoj“

En la raporto estis dirite ke la centra komitato de BEA estas en konstantaj rilatoj kun UEA kaj akiris aŭtoritaton antaŭ la ceteraj internaciaj kaj naciaj Esperanto-organizaĵoj. La Bulgara Espe

rantista Asocio estas unu el la plej aktivaj asocioj en la tutmonda esperantista movado. Ĝi estas en konstanta kontakto kun la pola, hungara kaj aliaj asocioj, kun la sovetaĵ esperantistoj.

LA RAPORTO DE LA KONTROLA KOMITATO DE BEA

Post la raporto de la prezidanto de BEA Hristo Gorov raportis la prezidanto de la kontrola komitato Haim Levi. Li montris en sia raporto iujn mankojn en la laboro de la estraro de BEA, ĉefe mankoj en la kancelario de la Asocio kaj en la financaj aferoj de la Asocio. Se oni ne starigos severan unuestrecon en la laboro de la kancelario, ĝiaj mankoj prezentos gravan malhelpon en la organiza agado.

Post la raporto estis elektitaj diversaj komisionoj: Pri la rezolucio, mandata komisiono, komisio pri elekto de nova centra komitato, komisio pri la voĉdonado, komisio pri telegramoj, komisio pri ŝanĝo de la statuto.

En la pridiskutado de la raportoj partoprenis pli ol 35 delegitoj. Parolis anuaŭ multaj fremlandaj gastoj. La reprezentanto de la esperantistoj el GDR interalie diris:

— En la pasinteco oni nomis vian landon lando de la rozoj, sed nun ni vidas ke la nuna socialisma Bulgario estas krom tio lando de la paca konstruado, lando de pacbatalantoj, lando de Esperanto kaj de esperantistoj.

Jan Toma el Francio salutis la bulgarajn esperantistojn en la nomo de franca laborista esperantista movado. Li rakontis kiel la franca popolo batalas kontraŭ la milito, kontraŭ la francaj reakciuloj kaj koloniigistoj, por senarmado kaj konservado de la paco.

La reprezentanto de Nederlando Bos-song salutante la kongreson diris:

— Mi estas ravita de via suna lando. Esperanto kaj Esperanto-movado helpas por interkompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj. Via 35-a esperan-

Granda tasko staras antaŭ la bulgaraj esperantistoj diskonigi per korespondado kaj per siaj gazetoj eksterlande la sukcesojn atingitajn en nia lando kaj nian popolon kun la atingajoj de la fremlandaj popoloj.

tista kongreso ĉeestata de multaj fremdlandaj gastoj-esperantistoj estas pruvo pri tio.

Salutparolojn antaŭ la kongreso faris ankaŭ esperantistoj el Svedio, Danlando, Italio, Aŭstrio kaj el aliaj ŝtatoj. Gravan paroladon faris k-do Zigmund Pap el Hungario pri la esperantista movado kaj la batalo por paco en la socialismaj landoj.

Pri la raportita periodo parolis la delegito de Pazarĝik Ivan Vasilev kaj de Stanke Dimitrov k-do B. Drenski.

Pri la mondpaca esperantista movado parolis k-ino Tinka Lakova. Ŝi diris ke ekzistas akordigo inter la Bulgara Nacia Komitato por Paco kaj la bulgara sekcio de Mondpaca Esperanto-Movado; pri la komuna laboro de Esperanto-movado kun la Komitato de la Bulgaraj Virinoj.

D-ro St. Kadiev de Sofio proponis, ke ĉiu esperantista societo devas ĉiusemajne kunveni kaj la diskutoj okazu nur en Esperanto, por ke ni estu pretaj por 48-a Universala Esperanto-Kongreso.

D-ro Todor Todorov el Sofio rakontis kiel la esperantistoj-kuracistoj sukcesis krei kuracistan esperantistan sekcion.

La delegito Vălcan Vălcanov en la nomo de la esperantista societo en Dimitrovgrad faris kritikon al la Centra komitato de BEA, ke ĝi ne sufiĉe utiligas la favorajn kondiĉojn por laboro en la diversaj regionoj de nia socia kaj kultura vivo. Ekzemple pri la manko aŭ ne sufiĉa kontakto kun la organizaĵoj de la instruista asocio. Manko de kontakto kun multaj aliaj soci-kulturaj

organizaĵoj, kie ni povas elmontriĝi kiel esperantistoj.

Antaŭ la kongreso parolis la malnova esperantista pionirino el Varna Zora Hans. Ŝi rakontis pri la indiferenteco dekomence ĉe iuj respondecaj faktoroj, sed pli poste ili komencis rilati al la esperantista movado pozitive kaj nun la akordigo de la laboro de varna esperantista societo kun aliaj sociaj kaj kulturaj organizaĵoj estas bona, ĉar la taskoj starantaj antaŭ ili por solvado estas komunaj.

La reprezentanto de la blindaj esperantistoj en Plovdiv interalie diris: „Ni, la blindaj esperantistoj en Plovdiv, lernas kaj laboras sub la zorgoj de nia glora komunista partio kaj la registaro. Ni estas trankvilaj, ĉar nia estanteco kaj nia estonteco estas sekurigitaj.“

La vicprezidanto de BEA Atanas Lakov parolis pri la ideologio en la esperantista movado kaj pri la idealisma flanko de la interna ideo. Li parolis ankaŭ pri la kunlaborado de BEA kun Unesko, UEA kaj aliaj internaciaj organizaĵoj.

Hristo Manolov el vilaĝo Polski Trâmbeŝ en sia parolado diris: „Ĉe ni la demando pri akcepto de Esperanto en la lernejo estas solvita. Ni jam instruas al la infanoj Esperanton en la lernejo. Ni kreis internacian esperantan grupon por korespondado. Niaj lernantoj kontaktiĝis kun la lernantoj-esperantistoj de urbo Omsk-USSR kaj regule ni korespondas.“

K-dino Trajana Petkova parolis pri la ligo de la virinoj-esperantistinoj kun la Komitato de la Bulgaraj Virinoj; pri la neceseco de kunlaboro inter la esperantistaj societoj; instrui infanojn en Esperanto por la venonta Universala Esperanto-Kongreso.

Fine la sekretario de BEA Violin Oljanov anoncis la rezulton de la konkurado inter la esperantistaj societoj. En la konkurado partoprenis 30 societoj. La transiran flagon de CK de BEA akceptis la prezidanto de S-to „Verda Stelo“ en St. Zagora.

La sekvantajn tagojn, 16-an de julio raportis la prezidanto de la mandata komisiono Nano Nanov.



LA RAPORTO DE LA MANDATA KOMISIONO

Karaj delegitoj,

La mandata komisiono, post kiam kontrolis la dokumentojn de la esperantistaj societoj sendintaj delegitojn al la nuna 35-a esperantista kongreso, trovis la jenon:

Ĉe la kongreso estas prezentitaj 59 esperanto-societoj per 411 delegitoj. El la montritaj 411 delegitoj la komisiono trovis kiel neregulajn 14 delegitojn, kiuj ne estas aprobataj. Ili estas de la societoj:

„Mondpaco“ — Karnobat — 1; „Vapcarov“ — Mezdra — 1, „Lumo“ — Târnovo — 1, „Esperanto-triumfonta“ — Petriĉ — 2, „Zamenhof“ — Razgrad — 1, „Vekiĝo“ — Kolarovgrad — 3, „Vasil Levski“ — Karlovo — 1, „Flamo“ — Kjustendil — 1, „Espero“ — Sliven — 1, „Internacia amikeco“ — Dimitrograd — 1, „Pac batalanto“ — Razgrad — 1.

Sekve, la regulaj laŭstatute delegitoj estas entute 397, kiuj rajtas partopreni en la voĉdonado.

El la delegitoj — 314 estas viroj kaj 83 estas virinoj, aŭ la virinoj prezentas 20 procentojn el la tuta nombro.

Laŭ profesio kaj laŭ instruiteco la delegitojn oni povas dividi jene:

Laŭ profesio:

1. Oficistoj	179
2. Laboristoj	49
3. Instruistoj	26
4. Lernantoj	36
5. Kuracistoj	7
6. Ĵurnalistoj	14
7. Inĝenieroj	5
8. Pensiuloj	54
9. Diversaj	27

Entute 397

Laŭ instruiteco:

1. Unuagrada instruado	15
2. Progimnazia	81
3. Meza	172
4. Supera	99
5. Duonsupera	30

Entute 397

Laŭ aĝo:

1. Ĝis 18 jaraĝaj	23 delegitoj
2. De 18 ĝis 28	95
3. De 28 ĝis 40	116
4. De 40 ĝis 60	140
5. Pli aĝaj ol 60 jaroj	23

La meza aĝo de la delegitoj estas 40 jaroj, kio montras, ke nia esperantista movado, laŭ la aĝo de siaj membroj, estas juna kaj sangoplena movado, esperiga por bona kaj rapida progreso.

Laŭ tio de post kiam la delegitoj estas esperantistoj ili estas distribueblaj jene:

1. Esperantistoj de 5 jaroj estas	200 delegitoj
2. Esperantistoj de 15 jaroj estas	42
3. Esperantistoj de 25 jaroj estas	33
4. Esperantistoj pli ol 25 jaroj estas	122

Entute 397

Laŭ politika aparteneco la delegitoj estas distribuataj:

1. Senpartiaj delegitoj	187
2. Membroj de Komun. partio	143
3. Membroj de BZNS (Agr. asocio)	7
4. Junuloj-Komsomolanoj	60

Entute 397

Karaj delegitoj, kion montras tiuj ciferoj? Ili montras, ke nia esperantista movado dum la milita periodo kaj dum la periodo de la kulto al la personeco progresis tre malrapide. Sed post la Aprila plenkunsido de Bulgara Komunista Partio 1956 a jaro nia movado rapide progresis. Nun en nia lando ekzistas tre favoraj kondiĉoj por evoluo de la movado. Tio estas ŝuldata antaŭ ĉio al la favora rilato de nia Komunista partio kaj la registaro al nia esperantista afero.

Post tio en la nomo de la komisiono pri la rezolucio raportis Atanas Lakov. Pri la rezolucio estis faritaj iuj notoj de la delegitoj, post kio ĝi estis voĉdonita kaj akceptita de la kongreso.

Pri la ŝanĝoj en la statuto de BEA raportis la prezidanto de la komisiono Violin Oljanov. Post mallonga diskutado la ŝanĝoj estis akceptitaj de la kongreso.

Pri elekto de nova Centra Komitato de BEA kaj Kontrola Komitato raportis la prezidanto de la komisiono pri propono de novaj organoj Ivan Batak-liev el Plovdiv. Oni proponis pligrandigi la konsiston de la Centra Komitato de 41 al 61 membroj. La kongreso akceptis tiun proponon.

Fine okazis balotado pri elekto de nova Centra Komitato kaj Kontrola Komitato. Post la kontrolo de la balotado la membro de la komisiono pri balotado Dimtâr Dojĉev anoncis la rezulton. La nova Centra Komitato kaj la Kontrola Komitato estis elektitaj unuanime.

La membro de la komisiono pri telegramoj Haim Levi tralegis saluttelegramojn al CK de BKP, al la Nacia Komitato por paco, al la Nacia Konsilan-

taro de la Patrolanda Fronto, al la Centra Konsilantaro de la sindikatoj kaj al UEA.

Dum la kongreso okazis fakkunsidoj: de instruista sekcio, de kuracista sekcio, de ĵurnalista sekcio, aparta kunveno de la junuloj, kunsido de MEM sekcio k. a.

Dimanĉe-vespere je la 15-a de julio estis prezentita kun granda sukceso interesa teatraĵo en la Burgasa teatro



de niaj ŝatataj artistoj esperantistoj Anani Anev, Belka Beleva kaj nia juna amatorino Delka Ĉolakova.

Lunde je la 16-a de julio estis organizita granda manifestacio tra la urbo

ĉekape kun orkestro. La kongresanoj honoris la pereintaju heroojn por popola libereco per almeto de florkronoj antaŭ ilia monumento.

Honore al la 35-a bulgara esperantista kongreso okazinta en Burgas la Urba konsilantaro nomis unu straton „Esperanto“. La nomigo de la strato fariĝis per solena inaŭguro. Tiukaze ĉe la inaŭguro parolis la prezidanto de Urba Konsilantaro Vălčo Minev kaj la prezidanto de BEA Hristo Gorov.

Okaze de la fermo de la kongreso, lunde vespere okazis granda mitingo de la paco en la Somera teatro, kie krom esperantistoj ĉeestis multaj urbanoj de Burgas. Parolis la sekretario de la distrikta komitato por paco kaj fremdlandaj gastoj-esperantistoj, post kio la kongreso estis fermita.

Dum la kongreso estis okazigita ekzameno de esperantistoj — tri personoj por instrukapablo kaj la ceteraj por scipovo de la lingvo.

Je la 17-a de julio la kongresanoj faris ekskursojn al la belegaj somerrestadejoj: Suna Bordo, Ropotamo, Primorsko, Nesebr k. a.

Nano Nanov

Nov-a Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio

- | | |
|----------------------------------|---------------------------------------|
| 1. Aleksandăr Dimitrov Georgiev | 22. Zdravko Iliev Velikov |
| 2. Angel Georgiev Ĉikov (Angelo) | 23. Ivan Bonev Sarafov |
| 3. Anastas Dimitrov Ĉalăkov | 24. Ivan Vasilev Bataklijev |
| 4. Asen Atanasov Penkov | 25. Ivan Dimitrov Keremidĉiev |
| 5. Asen Georgiev Grigorov | 26. Ivan Konstantinov Vasilev |
| 6. Atanas Iliev Gaev | 27. Ivan Kănev Ivanov |
| 7. Atanas Lakov Petkov | 28. Ignat Nikolov Ignatov |
| 8. Bogdana Ivanova Popova | 29. Ilia Marinov Iliev |
| 9. Bonka Minĉeva Mandeva | 30. Irina Miteva Markova |
| 10. Boris Kostadinov Drenski | 31. Kiril Stojanov Drajev |
| 11. Violin Canev Oljanov | 32. Koljo Petrov Panĉev |
| 12. Ganĉo Nedelĉev Ganĉev | 33. Krăstjo Dimitrov Petkov (Karucin) |
| 13. Georgi Idakiev Pavlov | 34. Liljana Mireva Lazarova |
| 14. Georgi Hristov Dimov | 35. Maria Petrova Preslavska |
| 15. Georgi Laskov | 36. Minko Ivanov Conkovski |
| 16. Dimităr Dojĉev Velev | 37. Miĥail Jankov Mekikĉiev |
| 17. Dimo Jekov Trudoljubov | 38. Nano Vutov Nanov |
| 18. Dimo Petrov Martinov | 39. Nikola Bogdanov Aleksiev |
| 19. Ing. Dobri Stanilov Dobrev | 40. Nikola Iliev Nikolov |
| 20. Donĉo Simeonov Hitrov | 41. Nikola Petkov Mitev |
| 21. Emil Ivanov Keremidĉiev | 42. Nkolaj Părvanov Nikolov |

43. Petăr Kolev Nenov
44. Petko Petrov Arnaudov
45. Radka Dančeva Rajnova
46. Radoslav Kuzmanov Tričkov
47. Simeon Delčev Simeonov
48. Simeon Petrov Dimitrov
49. Simeon Stefanov Ĥesapčiev
50. Slavčo Spasov Ŝijakov
51. Stojan Goranov Moraresku
52. Prof. d-ro Stojan Stoev Ĝugev
53. Tasko Borisov Tasev
54. Tinka Todorova Lakova
55. Trajana Spasova Petkova
56. Ĥristo Manolov Ĥristov
57. Ĥristo Marinov Gorov
58. Canko Petkov Murgin
59. Cvetan Nikolov Cvetkov
60. Ing. Ĉudimir Miĥajlov Kantargiev
61. Ŝterjo Zafirov Kukuŝev

Kontrola Komitato ĉe CK de BEA

1. Asen Aleksandrov Bonev
2. Vjara Kirilova Nikolova
3. Sveja Todorova Válova
4. Stefan Dimitrov Jončev
5. Ĥaim Buko Levi

Estraro de CK de BEA

Prezidanto: Ĥristo Gorov
 Vicprezidanto: Atanas Lakov
 Sekretario: Violin Oljanov
 Membroj: Dimităr Dojčev, Ivan Sarafov
 Ivan Keremidčiev, Krăstjo Karucin, Mihail
 Mekikčiev, Radka Rajnova, Simeon Simeonov
 Trajana Petkova

REZOLUCIO

de la 35-a Kongreso de la Bulgaraj Esperantistoj
 okazinta en Burgas de la 14-a ĝis la 16-a de julio 1962

La plej granda evento okazinta en la mondo post la kongreso en Târnovo (1960) estas la 22-a Kongreso de la Komunista Partio de Sovetunio, kiu celebras novan triumfon de la marksismo-leninismo. La Komunista Partio de Sovetunio faris grandan politikan herojaĵon, metinte finon al pasinteco karakteriza per siaj metodoj de kulto al la personeco en la laboro, kiuj malakcelis la rapidan evoluon laŭ la vojo al la komunismo. La 22-a Kongreso de la Komunista Partio de Sovetunio kaj la Novembra Plenkunsido de la Centra Komitato de la Bulgara Komunista Partio, kiu ĝin postsekvis, antaŭenpuŝis ankaŭ la ĉiuflikan evoluon de nia lando. Ili, kiel ankaŭ la evoluo de nia lando post la Aprila Plenkunsido, kreis tre favorajn cirkonstancojn pri la laboro de la Bulgara Esperantista Asocio, pri la disvolviĝo de la Esperantomovado en nia lando. Dum tiu ĉi periodo la Bulgara Esperantista Asocio ĉiuflikante subtenis la politikon de paco kaj interkompreniĝo de la popoloj, kiun firme efektivigis la socialisma tendaro fronte kun Sovetunio.

Dum la raportita periodo la Asocio notis konsiderindajn sukcesojn. La societoj fariĝis 130 kun pli ol 5000 membroj. La organiza, la kultur-kleriga kaj la ideologia laboroj pliboniĝis. La Centra Komitato de la Bulgara Esperantista Asocio gvidis la societojn pli konkrete kaj pli regule. La redaktado de „Bulgara Esperantisto“ ankaŭ pliboniĝis konsiderinde, kaj ĝia enhavo variĝis. Oni metis la komencon al sistemaj iniciatoj por plibonigo de la lingva nivelo de la membroj kaj plibonigo de la instruado de Esperanto per specialaj kursoj, ekzamenoj ktp. La plimulto el la societoj eliris el sia izolaĵo kaj kune kun aliaj organizaĵoj partoprenas tutpolajn manifestaciojn kaj aktivecojn, laborgrupojn, ekskursojn, renkontiĝojn kaj aliajn amasajn manifestiĝojn. Nian movadon aligis nova alfluo de junuloj.

Kune kun tiuj ĉi atingiĝoj la laboro de la Asocio suferas multajn mankojn. Ankoraŭ estas societoj, kiuj kondukas inertan vivon, ne scipovas interrilati kun la aliaj sociaj organizaĵoj kaj fari efikan propagandon. La laboro kun la junularo estas subtaksa. Iuj societoj ne pagas la membrokoton en la limtempo laŭ trimonatoj. Oni ne gvidas sisteme la internacian korespondadon. Oni alilas mankojn ankaŭ en la organoj de la Centra Komitato de la Bulgara Esperantista Asocio. Ne sufiĉa estas la postulemo al ili. La kritiko kaj la memkritiko ne estas sur la necesa alteco. Malgraŭ la farita konkurso pri verkado de lernolibroj kaj eldono de granda bulgara-esperanta vortaro, la tasko kontentigi la bezonon pri lerniloj ne estas plenumita. Nekontentigan agadon elmontris la fakoj „Internacia korespondado“ kaj „Instru-propaganda“. Nekontentiga estis ankaŭ la agado de la ĵurnalista sekcio rilate al la propagando, per nia gazeto kaj radio: La kancelario de la Asocio ankoraŭ ne respondas regule al la leteroj. Ankoraŭ estas okazoj de ne-ricevo de apartaj numeroj de „Bulgara Esperantisto“ kaj aliaj gazetoj.

Aŭskultinte kaj pridiskutinte la raporton de la Centra Komitato de la Bulgara Esperantista Asocio kaj de KK, la 35-a Kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio



DE C I D A S:

1. Plene aprobas la organizan, la kultur-klerigan kaj la propagandan agadon de la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio por la periodo de la 34-a ĝis la 35-a Kongreso.

2. Varme alvokas la bulgarajn esperantistojn aliĝi ankoraŭ pli intense al la konstruado de la nova vivo, partopreni plej aktive la konstruon de la material-teknika bazo de la socialismo por eniri pli rapide en la komunismon. Honore al la 48-a Universala Esperanto-Kongreso la nombro de la membroj de la Asocio pliiĝu de 5 000 al 6 000 personoj.

3. La Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio kaj la societoj fiksu la atingitajn sukcesojn, plubonigante la organizan laboron kaj plifortigante la asocian disciplinon.

La Centra Komitato kaj ĝiaj membroj el la distriktoj aktivigu la neaktivajn societojn kaj helpu al la pli malfortaj disvolvi pli vastan agadon.

4. Varbi alcelite novajn adeptojn de Esperanto precipe el la medio de laboristoj, kamparanoj kaj oficistoj. Niaj avangardaj laboristoj kaj membroj de agrikulturaj labor-kooperativoj devas uzi Esperanton, kontaktigante kun siaj fratoj en la aliaj landoj.

5. Daŭrigi kaj plibonigi la kultur-klerigan kaj ideoedukan laboron inter la membroj de la Asocio, legante konvenajn referaĵojn kaj raportojn. La bulgaraj esperantistoj devas esti homoj kun vastaj konoj kaj kulturo, kun supera spirito kaj morala pureco.

6. Fortikigi la fakojn de la Centra Komitato kaj precipe la fakon „Internacia Korespondado“ kaj „Instru-propagandan“, kaj ankaŭ la Journalistan Sekcion per konvenaj kamaraĵoj, kiuj povos plenumi la respondecajn taskojn en ĉi tiuj gravaj organoj de la Asocio.

7. La Centra Komitato kaj la estraroj de la societoj planu kaj efektivigu iniciatojn pri altigo de la lingvonivelo de la membroj kaj precipe de la instruado de Esperanto. Ĉiujare oni okazigu kursojn por preparo kaj repreparo de lektoroj kaj ekzamenojn por lingvoscio kaj instrukapablo.

8. Konstanta tasko de CK de BEA kaj de la societoj. precipe tiuj en la distriktaĵ centroj,

estu la daŭrigo de la insistaj klopodoj ĉe la Ministerio de la klerigo kaj la kulturo kaj la Klerigaj Fakoj ĉe la Distriktaĵ Popolaj Konsilantaroj por enkonduki la lernadon de Esperanto en la studrondojn de la lernejoj.

9. La societoj kaj ĉiuj esperantistoj disvastigu siajn ligojn kun esperantistoj el la tuta mondo kaj rakontu al ili pri nia paca kaj konstrua laboro. La Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio kunvoku konferencon pri interŝanĝo de sperto en la internacia korespondado.

10. Fondi junulajn grupojn en ĉiuj societoj, kie ankoraŭ tiaj ne ekzistas, kreante kondiĉojn por laboro laŭ la postuloj kaj la intereso de la nuntempa junularo. Helpi la estrarojn de la junulaj grupoj en la eduka laboro.

11. La redaktado de „Bulgara Esperantisto“ estu ankoraŭ plibonigita; ĝia aktivularo de aŭtoroj plivastigu; la enhavo de la gazeto estu variegita. La gazeto periode estu diskutata en la societoj. „Bulgara Esperantisto“ fariĝu skolo por edukado de junaj aŭtoroj.

12. La societoj uzu sisteme kaj organizite interesajn materialojn en la esperantaj gazetoj kaj korespondadoj, kiuj estas ricevataj ĉe ni. La materialoj estu uzataj por la lokaj ĵurnaloj kaj radio-aranĝoj, por elmontrejoj kaj murgazetoj.

13. Konstanta tasko de la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio estu la likado de novaj lernolibroj kaj lerniloj, iompostioma aperigo de lernolibroj por diversaj kategorioj de kursanoj.

14. Ĝis la fino de la jaro la societoj ordigu siajn kontojn pri la markoj „Esperanto-domo“.

11. Honore al la 8-a Kongreso de Bulgara Komunista Partio kaj al la 48-a Universala Esperanto-Kongreso oni varbu novajn esperantistojn en la societoj, oni denu al ili konkretajn taskojn.

La bulgaraj esperantistoj ankoraŭ pli intime unuiĝu ĉirkaŭ la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio fronte kun k-do T. Jivkov kaj montru ankoraŭ pli altan korean aktivecon en la batalo por plenumado de la ekonomiaj kaj aliaj taskoj.

ИЗМЕНЕНИЯ В УСТАВА НА БЕС

1. Чл. 1 в). След думите „в дух на“ да се прибави: „патриотизъм и пролетарски“. След думата „интернационализъм“ да се прибави: „на привързаност към лагера на социализма и мира“.

2. Чл. 2 д). След думата „статистически“ да се прибави „и исторически“.

3. Чл. 10 ал. III. След думите „членовете на“ да се прибави: „бюрото на“. След думите „ЦК на БЕС и“ да се прибави: „председателя“.

4. Чл. 18. Вместо „от 7—9 души“ става: „от 7—11 души“.

5. Чл. 20 ал. 2. След думите „БЕС“ да се постави точка, а последните думи „със съ-вещателен глас“ да се зачеркнат.

6. След чл. 21 да се създаде нов член 22 със следното съдържание: „В градове, където има повече от едно д-во, се образува градски комитет от еднакъв брой представители на всяко дружествено ръководство. Този комитет осъществява общи мероприятия и сътрудничество между дружествата. Комитетът определя председател и секретар“.

7. Номерацията на следващите членове се изменя с плюс една единица.

8. Стар член 22. В началото на изречението да се постави думата: „Организационни“. В края на първото изречение думите „в месеца“ да се заменят с: „на 3 месеца“.

9. Стар чл. 27. След думата „Asocio“, да се прибави тире и думите: „Centra Komitato“.

ИЗМЕНЕНИ ЧЛЕНОВЕ

Стар текст:

Изменя се така:

Чл. 1. в) да възпитава своите членове в дух на интернационализъм, като използва есперанто за укрепване и разширяване връзките с другите народи. . . .

Чл. 2 д) събира статистически данни за есперантското движение в страната;

Чл. 10. ал. III. Членовете на ЦК на БЕС и на КК при ЦК са по право делегати на конгреса.

Чл. 18. Централният комитет избира из своя състав БЮРО (Estraro de CK) от 7—9 души, като определя председател, подпредседател и секретар.

Чл. 20. Членовете на КК при ЦК на БЕС могат да участвуват в заседанията на ЦК на БЕС със съвещателен глас.

Чл. 22. Събранията на дружеството се свикват не по-рядко от един път в месеца.

Чл. 27. Печатът на БЕС е кръгъл, в средата петолъчка, а наоколо има надпис „Bulgara Esperantista Asocio“.

да възпитава своите членове в дух на патриотизъм и пролетарски интернационализъм, на привързаност към лагера на социализма и мира, като използва есперанто. . . .

събира статистически и исторически данни за есперантското движение в страната;

Членовете на бюрото на ЦК на БЕС и председателят на КК при ЦК са по право делегати на конгреса.

Централният комитет избира из своя състав БЮРО (Estraro de CK) от 7—11 души, като

Членовете на КК при ЦК на БЕС могат да участвуват в заседанията на ЦК на БЕС.

Организационните събрания на дружеството се свикват не по-рядко от един път в три месеца.

Печатът на БЕС е кръгъл, в средата петолъчка, а наоколо има надпис „Bulgara Esperantista Asocio — Centra Komitato“.

JUNULARA KUNVENO

en la kadroj de la 35-a Kongreso
de BEA en Burgas

La 16-an de julio, la trian tagon de la 35-a Kongreso de BEA, okazis la ĉefkunveno de la Junulara sekcio de la asocio. Senhezite ni povas nomi ĝin kunveno de novaj ideoj kaj de... nesufiĉa tempo. La 138 partoprenantojn-ge-

junulojn el la tuta lando kaj gastojn el eksterlando bonvenige salutis k-do N. Petrov, prezidanto de la Junulara grupo en Burgas. La kunvenon gvidis k-do D. Dobrev. Varmajn salutojn al la bulgara esperantista junularo trans-

donis la ĉeestantaj gastoj — R. Burmeister (GDR), s-rino H. Thumann (Aŭstrio), J. Thomas (Francio) kaj f-ino Ir. Skorupa (Pollando). Ili ĉiuj bondeziris sukcesojn al nia junularo kaj promesis amasan partoprenon flanke de iliaj landoj en la venontjara 19-a IJK en Vraca.

La raporton de la estraro de la Junulara sekcio legis la prezidanto — ing. S. Simeonov. En la diskutoj partoprenis 15 gejunuloj el 13 urboj, prezidantoj aŭ aktivuloj de lokaj junularaj grupoj. Oni faris multajn proponojn, inter kiuj aparte menciindaj estastiaj pri intergrupa konkurado, pri organizo de belartaj konkursoj, pri plivigligo de la kontaktoj inter la estraro kaj la lokaj grupoj. Reprezentanto de la gejunuloj el Varna proponis la venonta Tutlanda junulara balo okazu en Varna. Unuanima estis la opinio, ke la okazigo de la junulara kunveno en la lastaj horoj de la kongreso, en streĉita atmosfero, ĉe manko de tempo, negative influas al ĝiaj rezultoj. La malfruo de aliaj gravaj kongresaj eroj, precipe de la balotado, same malhelpas la junularan kunvenon kaj inverse. Mem ĝia konsidero kiel faka kunveno estas iom nelogika, ja la junuloj same havas siajn diversajn fakojn, kaj ilia partopreno en la fakkursidoj povus esti utila. Oni esprimis la opinion, ke eble plej konvena tempo por la kunveno estus la posttagmezo de la unua labortago de la kongreso. Tiamaniere krome, la decidoj de la junulara kunveno kune kun eventualaj proponoj, tuŝantaj la agadon de la asocio kiel tuto, estus prezentebaj antaŭ la kongresa plenkunsido.

La kunveno akceptis do la sekvan rezolucion:

La JUNULARA KUNVENO okazinta la 16-an de julio 1962, dum la 35-a kongreso de la Bulgara esperantista asocio en Burgas,

notas

- la konsiderindan organizan stabiligon de la Junulara sekcio

de Bulgara esperantista asocio.

- la pozitivan rolon, kiun ludis la organizitaj dum 1961 kaj 1962 — Tutlandaj esperantistaj junularaj baloj, por aktivigo de la esperantista junularo en la lando, por plivigligo de la kulturaj aktivecoj de la lokaj junularaj grupoj kaj por plialtigo de la lingva nivelo de la esperantistoj.
- la fondon de junulara Inform servo, kiu celas kompetentan informadon pri Esperanto en la junularaj medioj kaj largan informadon pri Bulgario, ka pri la landa movado eksterlanden.
- la kontentigan evoluon de la internaciaj kontaktoj de la bulgara esperantista junularo kaj la aktivan partoprenon de la Junulara sekcio de BEA en la vivo de TEJO kaj en internaciaj junularaj manifestigoj.

aprobas la agadon de la estraro de la Junulara sekcio.

decidas:

- 1) La Junulara sekcio de BEA nomiĝu BULGARA ESPERANTO-JUNULARO.
- 2) La estraro de BEJ konsistu el trimembra sekretariaro kun decida rajto kaj reprezentantoj el la tuta lando kun konkretaj komisioj.
- 3) La lokaj junularaj grupoj aktive helpu la societojn en ĉiuj iniciatoj kaj speciale en la kultura kaj turisma agado, ĉe la kolekto de la membrokotizo kaj de abonantoj por la asocia organo „Bulgara esperantisto“.
- 4) La estraro de BEJ kaj la lokaj grupoj klopodu pri fondo de junularaj grupoj ĉe ĉiuj pli grandaj societoj de BEA.
- 5) La junularaj grupoj flegu konstantajn kontaktojn kun la lokaj or-

ganizaĵoj kaj komitatoj de la Komsomolo; partoprenu en ĉiuj tutpopolaj kaj junularaj kampanjoj, helpo de la vilaĝoj, kolektado de kuracherboj ktp. por akiri ankoraŭ pli larĝan socian rekonon kaj pli altan aŭtoritaton de nia movado.

- 6) En kunligo kun la antaŭstarantaj dum 1963 internaciaj kongresoj en nia lando, la estraro de BEJ kaj la junularaj grupoj zorgu pri

— plialtigo de la lingva nivelo de siaj membroj per organizo de kursoj, konkursoj, parolrondoj ktp.

— plivigligo de la kulturaj aktivecoj kaj plialtigo de la arta nivelo de la kantgrupoj kaj aliaj ensembloj.

— intensigo de la internacia korespondado kaj pri ĝia saturigo per abunda informmaterialo pri Bulgario kaj pri la landa movado.

- 7) La informservo de BEA zorgu pri informado antaŭnaciaj instancoj, eldonadu informajn dokumentojn kaj prizorgu artikolojn por la gazetaro.

- 8) BEJ efektivigu konkretan kunlaboron kun la instruista sekcio de BEA por aktivigi la agadon en la lernejoj kaj popularigi la pozitivan sperton.

- 9) La junulara paĝo en gazeto „Bulgara esperantisto“ akiru pli klare fizionomion de organo de BEJ.

10. BEJ kunlaboru ankoraŭ pli aktive kaj konkrete kun la alilandaj esperantistaj junularaj organizaĵoj, sur kampoj kultura, informa kaj turisma.

rekomendas

— al CK de BEA, rezervi estonte por la junulara kunveno en

la kadroj de la kongreso la tutan posttagmezon de la unua labortago.

- al la estraro de TEJO, kunlabori pli elaste multmembre kun ĉiuj neesperantisaj organizaĵoj por disvastigo de la Internacia lingvo kaj por samtempa plialtigo de la aŭtoritato de TEJO, kiel internacia junulara organizaĵo.

- al la estraro de STELO, al la tutmonda esperantista studentaro kaj al Skolta Esperanto-ligo kunfandiĝi kun TEJO, por tiel esti pli ekonomie kaj rezultoplene utiligataj la fortoj de la esperantista junularo por la celoj de la movado.

La kunveno unuanime elektis la jenajn kamaradojn en la nova estraro: Al. Dimitrov, Anna Prahova kaj Emil Keremidĉiev el Sofio, Enjo Daskalov el Vraca, Jordan Angelov el Plovdiv, Momĉo Momĉev el Ruse, Nikola Pilev el Varna, ing. Simeon Simeonov el Sofio kaj Stefka Markova el Gabrovo. Samtempe kiel Komitatoj de TEJO estis reelektitaj N. Nikolov, D. Dobrev kaj S. Simeonov kaj novelektitaj E. Keremidĉiev kaj Al. Dimitrov.

Tuj post la kunveno okazis la unua plenkunsido de la novelektita estraro, kiu elektis S. Simeonov kiel prezidanto, E. Keremidĉiev vicprezidanto kaj Al. Dimitrov — sekretario. Oni interŝanĝis opiniojn pri la ĉefaj antaŭstarantaj taskoj kaj pri la konkretaj formoj de agado de la estraro.

La kunveno same sendis telegramojn al CK de la Komsomolo en Sofio kaj al TEJO.

POR LA PACO KAJ LA AMIKECO

1. KVANTO KAJ KVALITO

F La kvanto ĉiam kreskas kaj kreskas. La kongreson en Varna en 1958 partoprenis 1200 gekongresanoj, tiun en

Târnovo en 1960 — 1400. Nun la vagonaroj, la aŭtobusoj, la ŝipoj kaj la aviadiloj elŝutis en la kongresurbon Burgas pli ol 1800 geesperantistoj. Tio estas respegulo de la konstanta kresko



de nia Esperanto-movado, de la intereso al la internacia lingvo. La esperantistoj inundis la urbon kaj formis la karakterizan trajton de la apudmara urbo dum tiuj tagoj. La verdaj flagoj kaj la sloganoj salutis ilin, ili aŭdigis la esperanto-parolon ĉie. La 50 eksterlandaj gastoj el Hungario, Jugoslavio, Nederlando, Aŭstrio, Francio, Pollando, Germana Demokratia Respubliko, Italio, Rumanio, Danlando kaj Svedio, kolorigis la bildon de la kongresa plivigliĝo. La urbanoj povis konstati la praktikan aplikon de la internacia lingvo.

Ordinare la granda kvanto malaltigas la kvaliton. Sed dum tiu ĉi jaro evidente tio ne okazis. La amaso pli lerte regis la lingvon. Tio ne estas nur supraĵaj impresoj. Tion montris ankaŭ la ekzamenoj. Al ekzameno „L“ aperis 21 personoj (14 viroj kaj 7 virinoj). El ili plensukcesis 9, kiuj ricevis diplomojn por supera lingvo-kono. Por meza lingvo-kono ricevis diplomojn 10 personoj kaj malsukcesis nur du. Malgraŭ la plialtigitaj postuloj de la ekzamenkomisiono, la rezultoj estas pli bonaj ol antaŭe. La ekzamenitoj montris pli bonan preparon. Ĉiuj tri, kiuj sin prezentis al ekzameno „I“, sukcese ĝin eltenis.

2. INAŬGURO, INTERKONATIĜOJ, MALNOVAJ AMIKOJ

La inaŭguro solena de la kongreso okazis sabate, la 14-an de julio. Eĉ la vasta subĉiela somera teatro montrigis nesufiĉa por enteni ĉiujn gekongresanojn kaj interesigantan urbanaron. Ĉe la eksono de la Esperanta himno aplaŭdegoj ekskuis la aeron. La miloj da ĉeestantoj rekompencis danke la honoron kaj la orkestron. Gratuloj de sociaj kaj kulturaj organizaĵoj. Varmaj vortoj de solidareco en la batalo por paco fare de la eksterlandaj gastoj. Supera momento de la solenaĵo estis la fanfara eniro kaj gratulo de la infanoj-„pioniroj“. Ĝi provokis la admiron kaj la aplaŭdegojn de la esperantistaro.

Miloj da steloj surŝutis la bluan ĉielon de Burgas, kiam la kongresanaro sin direktis al la salonegoj de la luksa restoracio „Primorec“. La interkonatiĝa vespero komenciĝis. La malnovaj amikoj renkontiĝas kun ĝojkrioj. La novuloj rigardas kun intereso la manifestiĝon de la tradicia amikeco de la veteranoj kaj serĉas konatiĝojn. La dancplaceto konfirmas la malnovan amikecon kaj metas la bazon de novaj. Ĉie regas festa gajeco. . . Malfrue en la nokto reeĥas la junecaj kantoj kaj infekta rido.

La laborkunsidoj pasis en bona ordo. Multajn interesajn aferojn rakontis la delegitoj pri sia agado, utilaj proponoj estis faritaj. Rimarkinda fakto estis en tiu ĉi kongreso la aktiva partopreno de la junaj esperantistoj. Tio ĉi ja estas signo kun granda signifo.

La mitingo de la paco denove substrekiis la strebon de la popoloj al paco kaj frateco kaj la utilon de Esperanto en tiu batalo.

La ekskurso al la ĉarma rivero Ropotamo estis vera ĝuo post la streĉaj kongresaj tagoj. Ne mankis la konstantaj kunvojaĝantoj de la gajaj esperantistoj — la rido, la ŝercoj, la kantoj en la vastaj, ombriĉaj arbaroj kaj sur la mara bordo.

Restos en la memoro la gajaj kaj ĝojplenaj tagoj de la 35-a. Sed . . . memoraĵoj ne estos en la albumoj de la kongresintoj. LKK ne povis certigi profesion fotografiston por belaj kaj komunaj fotoj. La estontaj LKK evitu la gravan preterlasojn de niaj Burgasaj geamikoj.

La kongreso estis fermita kun la alvoko: „Ni preparu nin bone por la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio“. Kun tiu ĉi slogano la esperantistoj en nia lando devas vivi kaj labori dum la kuranta kaj la estonta jaroj, kun ĝi kaj per ĝi ili iru antaŭen de sukceso al sukceso!

Violin Oljanov

Jam la trian fojon mi vizitas Bulgarion. La unuan fojon mi venis por rikolti unu el la parfumaj rozoj kiuj floras en tiu ĉi tero — kaj ŝi iĝis mia edzino. La duan fojon mi ĉeestis la Esperanto-Kongreson en Târnovo. Kaj, jen, la trian fojon mi denove troviĝas inter miaj bulgaraj gefratoj, por ferii en ilia eta sed mirinda lando.

Mia edzino kaj mi ĵus revenas de Burgas, kie ni ĉeestis la 35-an E-Kongreson. Neforgeseblaj tagoj, bedaŭrinde forflugintaj tro rapide! Mi rememoras kun speciala ĝuo la unuan vesperon, kiam oficiale malfermiĝis la kongreso en la Somera Teatro. Post la programo de popolkantoj kaj la salutparoloj, jen kortuŝa surprizo: la du vicoj da pioniroj, kiuj kun buntaj flagoj venis disdoni florbukedojn al ĉiuj eksterlandaj delegitoj. Tio estis unu el plej belaj kaj bone sukcesintaj iniciatoj de mi vidita ĉe E-Kongresoj. Cetere, la tuta vespero forflugis en aparte agorda etoso. Oni ne nur aŭdis sincerajn vortojn pri paco (ĉefe efika estis la parolado de la reprezentantino de la bulgaraj patrinoj). Oni ankaŭ sentis kaj vidis karakterizan atmosferon de homa frateco, amikeco, paco: tiu atmosfero kiu ĝenerale regas en ĉiuj E-Kongresoj, sed ŝvebas pli potence kaj sincere tie ĉi, en bulgara tero, kie la deziro de tuthoma paco estas la plej reala, profunda sento de ĉiu homo.

La sekvintaj tagoj alportis al ni saman ĝuon kaj varmecon: Ĉirkaŭitaj de la kutima bulgara gastamo, sieĝataj de la adres-petoj (mia mano duonkripligis. . .), nutrataj per la bongustaj kaj fortikaj naciaj manĝaĵoj („kebabĉeta“, „ŝiŝĉeta“ kaj „kjufteta“), loĝigataj ĉe la plej moderna hotelo de la urbo, ni sentis nin hejme, inter gefratoj.

La lastan tagon oni kondukis nin al Ropotamo kaj al Nesebâr. Ĉe la restoracio ni formis internacian tablon: 8 personoj el 7 landoj-Aŭstrio, Bulgario, Danlando, Hungario, Italio, Jugoslavio, Nederlando (ĉeestis du nederlandanoj). Pro tio, ke ni faris akademion pri anekdotoj (ĉiuj ĉastaj, memkompreneblaj), nia tablo iĝis la plej gaja kaj brua en la tuta restoracio. De fusilpafa distanco oni povis aŭdi niajn kriacojn. Venkis la konkurso la bulgaraj anekdotoj, kiuj montrigis la plej . . . spacaj.

Kun aparta feliĉo mi ankaŭ rememoras, kio okazis en Burgas, la tagon antaŭ la malfermiĝo de la kongreso. Sur la placo antaŭ la stadidomo ni renkontis hazarde unu el la bulgaraj majstroj de la kaval-ludado, Jeljo Kozarov, el vilaĝo Karanovo (Sliven). La tutan tagon ni restis kun li, kaj mi registris unu tutan sonbendon per liaj majstre ludataj popolmelodioj. Nekredeble, kion li sukcesis eltiri el sia instrumento! Al la simpatia ludisto mi ŝuldas multevalorajn konsilojn kaj instruojn pri la kaval-ludado.

Post la kongreso mia edzino kaj mi vizitis Nesebâr, la Sunan Bordon kaj la Oran Strandon ĉe Varna. Kiel rakonti per malmultaj vortoj miajn impresojn? Mi diros nur tion ĉi: pere de Esperanto mi vizitis preskaŭ ĉiujn eŭropajn landojn, sed nenie mi trovis somerumrestadejojn tiom perfekte planitajn, tiom harmoniajn. Ĉefe impresis min la arkitekturo de la luksaj hoteloj, restoracioj, dancejoj (plej moderna sed samtempe bazita sur la tradicia bulgara stilo) kaj la plena respekto de la naturo. Ĉie flortapiŝoj, arboj, herbaroj, ornamigaj plantoj. Mi eĉ vidis restoracion konstruitan ĉirkaŭ arbo („Malnova Kverko“); en la kovrata halo en alia restoracio („Kazino“) oni lasis grandan arbon, ĉir-



kaŭ kiu senĉese flugas la hirundoj. Kaj jen, antaŭ la Ora Strando, grandega funkcia horloĝo farita per floroj kaj plantoj! Antaŭ du jaroj mi estis ĉefe impresita de la kamparmastruma organizo; nun mi vidas kun ĝojo, ke la lando envicigas je la unuaj lokoj ankaŭ pri moderna arkitekturo kaj planado de somerumejoj. Mi havas nur unu grandan bedaŭron, ke ĉiuj mirindaĵoj de Bulgario (ĝia popolmuziko, ĝiaj somerrestadejoj, ĝia kamparo, la karaktero de ĝia popolo...) estas tro malmulte konataj en mia lando. Kiom koncernas min, mi faris kaj faros ĉion eblan por diskonigi ĉion ĉi al miaj samlandanoj, esprime ke tiel mi povos almenaŭ parte ĉelsuldiĝi pri ĉio kion Bulgario donis kaj instruis al mi.

Se tiel sukcesis la 35-a Nacia Kongreso, oni facile antaŭvidas kiel sukcesos la 48-a Universala Kongreso kiu fine okazos sur bulgara tero.

Do, denove dankon al vi, ĝeamikoj, kaj ĝis revido!

Filippo Franceschi

LA POŝTMARKO

Je la fino de la mondmilito hungara samideanino diris al mi: „Venu kun mi en la poŝton! Oni ĵus disvendas tre multekostajn jubileajn poŝtmarkojn okaze de la fino de la mondmilito. Nepre aĉetu al vi kelkajn!”

En la koridoro de la oficejo jam staris longega vosto da civitanoj, pacience atendantaj.

Mi ricevis mian jubilean serion. Depost tiam mi komencis pli profunde ŝati la poŝtmarkon. Mi konvinkigis, ke la malgranda bunta papereto povas vere prezenti ion interesan. Mi komencis kolektadi poŝtmarkojn, aranĝis malgrandan albumon, kiun mi de tempo al tempo foliumas.

Vere, apenaŭ oni povus prezenti al si pli trafan respegulon de la historiaj eventoj, de la kulturaj interesoj kaj de la belarta nivelo de unu ŝtato kaj popolo ol la eta poŝtmarko. Ĝi ja povas esti eldonaĵo nur de sendependaj ŝtatoj, de iliaj plej superaj registaroj. La eldonado de la poŝtmarkoj estas grava evento por ili. Oni ja bonege scias, ke la poŝtmarkoj, per siaj milionnombraj pecoj, estas bonega propagandilo pri la „plej noblaj tendencoj de la regantoj“. Oni eltrovas la plej bonajn pentristojn, ŝarĝas plej kompetentajn komisionojn por ilia preparo kaj akcepto. Oni forgesas nur unu — ke la tempo rapidege fluas, ke la tendencoj kaj la idealoj de la ŝtatoj ne estas alnajlitaj, ili tiel same ŝanĝiĝas. Apud la grandkapa bildo de la hungara imperiestro Ferenc-Josef kuŝas krono kun la klinigita kruco de la hungaraj reĝoj, apud ĝi — la bildo de la faŝista regento Horti, apud ĝi — la simbola bildo de la liberigita hungara Herkuleso kun martelo en la dekstra mano, kun prezoj de unu poŝtmarko de 100—200—500—1000 pengjoj.

Apartan belecon prezentas la ricevitaĵ el fremdlando kovertoj kune kun la poŝtmarkoj, stampiloj, adresitaĵ de simpatiaj ĝeamikoj. De tempo al tempo mi malfermas mian albumon kaj pensadas:

— Vere, kiajn flugilojn donas al ni Esperanto per la ebleco kontaktiĝi kun tiel multe da ŝtatoj, nacioj kaj homoj, kian avantaĝon ni havas per la ebleco deteni tiel eventoriĉajn pecojn de la historio kaj de la beleco de nia patrino Tero.

D-ro Stefan Kadiev

MIAJ AMIKOJ

Nun, dum ni preskaŭ kuras tra la strato, permesu, ke mi konigu al vi ankaŭ tiel rapide miajn du amikojn.

Ili estas miaj amikoj jam de mia infana aĝo. Ni estas samaĝuloj kaj kreskis en la sama kvartalo. La infanaj ludoj proksimigis nin. Poste en la lernejo kaj en la gimnazio ni estis ĉiam en la sama klaso. Nun kiel junuloj ni restas intimaj amikoj, kvankam ni studas en diversaj fakultatoj de la universitato. Mi studas juron, Nikolao — matematikon, Marko — filozofion.

Jen al vi Nikolao: junulo forta, ne tre alta, iom diketa, rondvizaĝa, bruna. Lia tuta figuro elmontras sanon kaj ĝojon.

Kontraŭe Marko estas alteta, malgrasa, blonda, iom pala kun brila rigardo.

Nikolao estas babilema. Li preskaŭ senĉese parolas, gestas. Kaj li deziras, ke la aliaj aŭskultu nur lian parolon. Marko estas silentema kaj pensema.

Nikolao amas plej multe la sporton; li estas pasia futbolisto. Marko emas pli al la scienco kaj la artoj; li estas tre legema.

Nun tra la strato Nikolao ne ĉesas paroli kaj demandi pri Esperanto. Li estas entuziasmo kaj rapide komencas flami. Jam la ideo pri internacia lingvo plaĉas al li. Li decidas lerni Esperanton kaj en sia fantazio li jam estas esperantisto, li veturas en fremdaj landoj...

Marko estas skeptikulo. Li ne alprenas tiel rapide la novon. Li silente aŭskultas la babilojn de Nikolao kaj atendas ĝis tiu ĉesos paroli, por doni kelkajn konkretajn demandojn. Liaj demandoj elmontras dubemon. Li deziras ke oni montru al li la esencon de la afero. Li deziras unue vidi propraokule kion prezentas la internacia helpa lingvo, antaŭ ol formi al si definitivajn opiniojn. Li estas videma kaj sciema.

Nu, en la kurso ili ambaŭ povos vidi kaj konvinkigi pri la esenco kaj la kvalitoj de Esperanto.

Proverboj. — Babilema amiko estas pli danĝera ol malamiko.

Ne helpas spegulo al malbelulo.

Por saĝulo — leciono, por malsaĝulo — bastono.

VERBO

Mi volas veni.

Verbo en infinitiva formo komplementas alian verbon, kiam la du verboj havas saman subjekton:

Mi volas veni = *Mi* volas ke *mi* venu.

Vi volas kanti = *Vi* volas ke *vi* kantu.

Mi volas ke vi venu. Vi volas ke mi kantu. Mi volas ke ĉiuj kantu.

En la lastaj proposicioj la subjekto de la ĉefa verbo estas unu, kaj la subjekto de la komplementa verbo — alia. En tiu kazo la dua verbo ne povas esti en infinitivo, sed estas en volitiva formo (u-modo); oni ligas ĝin kun la ĉefa verbo per la konjunkcio *ke*: ke vi venu, ke mi kantu ktp. La konstruo *ke... -u* respondas al la subjunktivo en la latina kaj aliaj lingvoj.

RIMARKO I. — *Atentu pri la speciala uzo de infinitivo en frazoj kiel: Mi aŭdis lin krii (vidu lec. 8).*

RIMARKO II. — *La esperanta volitivo respondas jen al la imperativo, jen al la subjunktivo de la eŭropaj, lingvoj, laŭ tio ĉu ĝi estas en ĉefa aŭ dependa proposicio. (P. V.).*

SUFIKSOJ

EM signifas: kiu estas inklina al tio, kion esprimas la radiko, aŭ kiu amas fari tion, kion esprimas la radiko (respektive la radikalo) de la vorto. Laborema — kiu estas inklina al laboro, kiu amas labori. Legema — kiu amas legi. Sportema — inklina al sporto. Kantema knabino. Parolema homo. Mangema infano. Dancema. Videma. Sciema.

UL signifas personon, individuon pri kiu estas karakteriza tio, kion esprimas la radiko (resp. la radikalo) de la vorto. Junulo — juna homo. Blindulo — blinda homo. Riĉulo. Belulino. Babilemulo — babilema homo, homo, kiu amas babili. Samtempulo — homo de la sama tempo. Antaŭulo — homo, kiu vivis antaŭe. Posteuloj — homoj, kiuj vivas post la nuna generacio. Subulo — homo, kiu servas, laboras, oficas sub la ordonoj de iu alia persono.

RIMARKO. — *Kiel escepto oni uzas tiun sufikson pli larĝe por esprimi en zoologio animalajn specojn: vertebrulo — besto, kiu havas vertebron; rampulo — besto de la klaso de vertebruloj kun malvarma sango (serpento, lacerto k. a.). Ankaŭ por esprimi ekzemple nomojn de ŝipoj: trimastulo — ŝipo, kiu havas tri mastojn, ktp.*

NOTINDAJ VORTUZOJ

Konigi: Mi konigas al vi mian amikon.

Sciigi: Mi sciigas al vi tion = Mi sciigas vin pri tio.

EKZERCOJ

1. Nia instruisto volas, ke ni ĉiuj parol... esperante.

Mi insistis, ke ŝi nepre skrib... al li leteron.

En sia letero li petis, ke mi vizit... lin.

Li proponis, ke ŝi lud... je la piano.

2. Homo, kiu amas	la ekskursojn,	estas	.	.	.	.
	manĝi,		.	.	.	.
	dormi,		.	.	.	.
	paroli,		.	.	.	.
	ŝercojn,		.	.	.	.
	rapidi,		.	.	.	.
	kritiki,		.	.	.	.

2. Malriĉa	homo estas	.	.	.	.
Brava		.	.	.	.
Saĝa		.	.	.	.
Malsana		.	.	.	.
Feliĉa		.	.	.	.
Sercema		.	.	.	.
Ridema		.	.	.	.

4. Homo, kiu	anstataŭas iun,	estas	lia	.	.	.	.
	mensogas,		.	.	.	.	.
	pensas,		.	.	.	.	.
	estas kontraŭ ni,		nia	.	.	.	.

¹ *Leg* estas radikilo; *legem* estas radikalo; *pur*, radikilo; *malpur*, radikalo.

GRAVA NOVAĴO EL GREKLANDO

La Ministerio de Nacia Edukado kaj Religiaj Aferoj en Greklando sendis al ĉiuj lernejoj en la lando cirkuleron 204 de 26. VI. 1962, per kiu ĝi rekomendas la libervolan instruadon de la internacia lingvo Esperanto. En la cirkulero interalie estas dirite: „Konsiderinte ke unu tre kontribua rimedo de spirita kontakto de la popoloj kaj pri strikta inter ili interkonatiĝo kaj interfratiĝo, estas, krom aliaj, ankaŭ unu komprenebla de ĉiuj internacia lingvo, kiel la jam formiĝinta kaj instruata en multaj landoj ESPERANTO, kaj rememorigante malnovajn cirkulerojn de niaj antaŭuloj „Pri instruado de la lingvo ESPERANTO al la dezirantaj lerni ĝin studentoj kaj lernantoj“, ni denove ordonas, ke vi havigu ĉiun eblan faciligon tiucele al la Profesoroj de la „Supera Helena Esperanta Instituto“ de Ateno, kiuj prenis sur sin senprofite la instruadon de la lingvo.

Al la Direktoroj de la lernejoj kaj ĝenerale al la havantaj la inspektadon de la edukado de la lernantoj, studentoj, pluinstruata (instruataj supleme post ilia diplomigo) instruistoj ktp. ni rekomendas, ke ili eksponu al la lernantoj la signifon kiun povas havi por la popoloj la ellernado kaj, konsekvence, la rekta per ĝi interkompreniĝo kaj interŝanĝo de konoj kaj ideoj, kaj ili rekomendu al la partoprenontaj la kursojn, sekvi kun intereso la instruadon de **Esperanto**.“

La cirkulero subskribis la Ĝenerala Sekretario de la Ministerio Chr. Solomonidis.

Do, la obstina agado de Helena Esperanto-Asocio donis sian rezulton. Ni deziras pluajn sukcesojn al la Esperanto-movado en nia najbara lando Grekio.

Ivan Burin

ZORGOJ ĈIUTAGAJ

L' aŭror' kun freŝec' en fàbrik' nin atingas
 en kampo kaj sur armatur',
 kun ĝoj' al brigadoj salute ĝi svingas
 matene tra hela purpur'.

Ni dronas en zorgoj tro pezaj dum tagoj,
 sed ame ni bolas en far' —
 kaj svingas ni alte standardojn skarlatajn,
 la fortoj hardiĝas tra bar'.

La kreo per fajraj bategoj tempestas
 en eta, malgranda ajar',
 konstruo de l' novo unike majestas —
 kreigas nun nova homar'.

Nin varme alblovas grandegaj alt-fornoj,
 allogas nin kampa torent',
 senĉese ni zorgas ekstermon de l' dornoj
 kaj viglas dum nokt' sur posten'.

L' aŭror nin renkontas en ĉiu ja loko,
 surŝutas niu suna radi' —
 la tagoj de nin tempesta epoko
 forflugas regataj de ni.

Tradukis: Canko Murgin

Asen Grigorov

AVIADILOJ

Aviadiioj sur ĉielo!
 Gracie, kiel cignoj blankaj,
 arĝentkoloro briletantaj
 aperas en la blua helo.

Ho, la blindiga suna lumo!
 Perdiĝas ili brila oro
 kaj reaperas el la foro,
 bruante per minaca zumo.

Subite bomboj siblas forte,
 eksplodas tondre en la urbo!
 Ekestas krioj kaj perturbo,
 la homoj kuras, falas morte!

Nigrigas helo, bluo, briloj!
 La sun' aspektas tiel stranga!
 Finiĝis la bombado sanga,
 forflugas la aviadiloj.

Radias ree blu' ĉiela!
 Ho, kiam el la sanga tero
 vi, feraj birdoj, malaperos,
 foriros kiel song' malbela?

(En malliberejo de Sofia, 1941)

Ada diris al ni por konsolo:

— Pensu, ke tio okazis antaŭ du jaroj!

Lia rideto estis sincere gaja, el liaj okuloj radiis ludemaj ruzetaj flametoj, en lia voĉo sonis trankviliga bonkoreco de patro, kiu pardonas kaj prudentigas.

Tamen tiam, en 1923, kiam „Melpomena frapetis, sed. . . ne eniris“, mal-antaŭ la kulisoj de la teatra scenejo en Târnovo, ni konsternigis ne malmulte kaj miskondutis ne tre pardoninde. Ada devis perforte resti gaja kaj bonkora kaj pardonema „patro“.

Dankon! Ĉarma estis lia saĝega kaj konsoliga konsilo.

Sed Gunĉo Gunĉev, Mara Krušovska kaj mi mem tre malfacile akceptis ĝin tiam, ĉar. . . ĉar ni estis ankoraŭ tre junaj kaj. . . tre koleraj pro la kapricemo de Elisaveta. . .

Nur ŝi kvazaŭ ne sentis honton kaj singenon antaŭ la tuta nia [esperantistaro kaj la alilandaj gastoj. Nur ŝi kvazaŭ forgesis, ke Gunĉo kaj Mara venis el Pleven en Varnon 3—4 tagojn pli frue, ke 3—4 tagojn dufoje ĉiutage ni ripetadis la teatraĵeton, ke ni ĝin ripetadis eĉ en la vagonaro al Târnovo, kien ni veturis kun preteco kaj dezirego liveri al la kongresanaro plezuron kaj „fieran ĝojon“ per tiu gaja „komedieto en Esperanto“. . .

Gunĉo kaj Mara bedaŭris pri sia vane elspezita mono por superflua veturo de Pleven ĝis Varna, pri la vane perdita en Varna tempo kaj pri la vana revo por „fervora servo“ al la E-movado. . .

Mi bedaŭris pri la samo, tutkore kompatis ilin ambaŭ kaj konsideris la kapricon de Elisaveta kiel mian propran kulpon.

Kial mi povis kredi, ke ŝi ne perdis al ni en la lasta momento? Mi ja bone konis ŝin. . . Mi ja estis „franko Zo“ — sentis min tre malnova jam esperantistino, preskaŭ patrino inter niaj gejunuloj, tutkore ja fervoris kaj fervorigis ĉiujn. . . Kial do mi eraris, enmiksinte ŝin en la aferon? . .

La konsilo de Ada igis min enpensiĝi.

Ŝajnis al mi, ke li ne povas resti trankvila, sed montris sin gaja, ke li rajtas riproĉi, sed anstataŭ tio trankviligis kaj konsolis nin mirinde trafe. . . Kial tamen mi ne povas plene obei lin?

La ludemaj fajreretoj en liaj okuloj saltetis ribele — jen pardonis kaj konsolis, jen riproĉadis kaj emociigadis (almenaŭ min). . . Do, kion fari? . . Devas, devas mi esti estontece pli atenta kaj nepre antaŭvidanta la eventualajn „kapricojn de la sorto“. . . Por ne erari plu!

La „amuzvespero“ estis perdita por mi.

Junaj kaj nejunaj, viroj kaj virinoj — ĉiuj kvazaŭ plene forgesis la konfuzan okazintaĵon kaj volonte ekdancis kaj dancadis. Nur mi restis konfuzite senhumora. Kaj Elisaveta diris al mi ŝajne por konsolo, tamen infane senzorge kaj senpente, eĉ gaje kaj iel preskaŭ fiere:

— Ĉiuj preferas danci, kaj bone okazis, ke ni ne ludis la teatraĵon. Ĝis meznokto ĝi daŭrus kaj ne restus multa tempo por dancoj.

Ŝi do opiniis ke dank' al ŝi ĉio estas ja en pli „bona ordo“!

Mi silentis, nenion diris — ne povis tiam pardoni al ŝi kaj al mi mem ŝian hontigan kapricon. Iomete nur mi pardonis ŝin la morgaŭan tagon, kiam ankaŭ ŝi partoprenis la sekretan kunsidon de nia „neleĝa“ komunista grupo, gvidita de Panajot Kolev.

Tamen pasis jaroj kaj iom post iom „franko Zo“, kiel „E-patrino“ de la junaj kaj novaj geesperantistoj poste, komencis kompreni pli bone la tiaman saĝegan konsilon de Ada.

Ofte ja okazadis tiel, ke al senesperigitaj kaj elreviĝintaj pro ia eraro aŭ malsukceso gekamaradoj mi mem devis diri kaj diradis jam:

— Pensu, ke tio okazis antaŭ du jaroj!

Kaj la nervoj malstreĉiĝadis, ne ŝiriĝis, ne suferigis niajn korojn kaj ne pereigis niajn revojn.

Kaj viglaj ni ĝisvivis la „Naŭan de Septembro“.

Ĉu ne tiel ni ĝisvivis ankaŭ la Tagon de la Paco, de la absoluta senarmigo, de la poreterne venkita Milito? . .

Ni forĝu la feron, ni fosu nian sulkon! . . Neniam en streĉa bedaŭro, ĉiam en trankvilaj esperoj kaj revoj. . .

Ĉar iam. . . kiam ajn. . . ni certe „atingos la celon en gloro“!

Kaj tiam. . . ne estos plu kapricoj kaj ŝirigantaj nervoj!

Zora Mladenova-Hans

VIKTIMOJ DE MODO

En tramo bildojn oni povas vidi,
pri kiuj homo nepre devas ridi,
Prezenti penos ĉion mi laŭvice —
la scenojn bonhumore, ne malice,
j e n e:

1

Knabino harojn laŭ la lasta modo
kombinis je ĉevala vost' kun nodo;
ĉu tion, kion h'avas best' en posto,
ŝi nun produktos en la kap' sub vosto?
P e n e.

2

Apuda sidas ŝtone, ĉar frizuro
konkuras ŝia kun Ejfela turo:
glorata estu tiu „arkitekto“,
eltrovo kies brilas sen difekto —
p l e n e!

3

Dekolto de pli aĝa in' surbruste
aspektas interese kaj bonguste.
Eĉ bebo gaje vokas „Njam, njam cico!“
Diveni, ĉu nur temas pri kaprico?
Ĝ e n e.

4

Malkovras la mallonga jup' de damo
femuran onon, kiun kun aklamo
avide maljunul' okule glutas,
virino malatentas lin kaj mutas
s p l e n e.

5

„Bontonon“ snoba junularo fuŝas,
knabegoj nun razilon eĉ ne tuŝas.
Avin' postulas lokon tuj kuraĝe,
„barbulon“ peli pretas ŝi „masaĝe“ —
ene .

6

En lasta loko de vagonangulo
prezentas sin Tarzano-prastrangulo.
Lin certe perdis en arbar' ĉemizo —
ne estas por ni ĉi afer' surprizo —
ne! ne!

7

La kapo kalva, sed la brust' kaj
ventro —
kovritaj de haregoj — lia centro;
atakas ĝin alterne muŝoj, vespoj,
por ili tie estos decaj nestoj . . .
Svene!

*

Nur kelkajn tipojn mi prezentis skize
kaj senpretende, tiel ne precize;
surrada panoptiko ĵus ekhaltas —
hene . . .

Milda Jakubcova, Prago

REVO

Mi amas vin kaj ŝajne pli
ol kiam ajn antaŭe, kara,
pro tio ĉiunokte mi
en revoj dronas kun amaro.

Kaj se alvenas dorm', en ĉarm',
figuro via tuj sin levas.
Ruliĝas de okuloj larm',
kaj mi dum longa tempo revas. . .

Mi songas samtiele nun
kaj vin rigardas mi image,
flustradas milde jam la lun':
„Ho, li revenos iutage“!

Rosica Georgieva
Pazargik



PRI LA ESPERANTO-BULGARA VORTARO

K-do Metodi Pančev faris malgrandan enketon pri la Esperanto-bulgara vortaro. Li direktis kelkajn demandojn al k-do Atanas D. Atanasov, redaktoro de la vortaro, kiu estis afabla kaj donis respondon al la starigitaj demandoj.

1. Kiuj estas la aŭtoroj de la nova vortaro?

Ili estas: Ivan Sarafov, Dim. Simeonov, Kiril Georgiev, Simeon Hesapčiev kaj Georgi Dimov (Varna). Proporcie la lastaj du havas malgrandajn partojn en la tuta laboro — Hesapčiev prilaboris nur la literon **M**, kaj Georgi Dimov — la literon **N**. Mi mem estas redaktoro, mi gvidis la verkadon kaj korektis la manuskripton.

2. Ĉu tiu ĉi vortaro distingiĝas disde la ĝisnunaj Esperanto-bulgaraj vortaroj kaj per kio?

Certe estas diferenco inter ĝi kaj la antaŭaj vortaroj. Antaŭ ĉio en la vortkonsisto — laŭ la nombro de la donitaj vortoj. Ĝi strebas prezenti la aktualan vortkonsiston de Esperanto. Krome ĝi donas apud ĉiu radikvorto ankaŭ multajn derivaĵojn.

3. Kian rilaton havas la aŭtoroj de la vortaro al la neologismoj?

La demando — ĉu neologismoj devas eniri la vortarojn kaj en kia grado — estas tre delikata. En 1910 prof. Gr. Maupin formulis la jenan principon: en Esperanto-nacilingvaj vortaroj oni donu ĉiujn vortojn, renkonteblajn en Esperanto-tekstoj, por faciligi la legadon de Esperantaj libroj fare de ĉiu, sed en nacilingvaj-Esperantaj vortaroj oni donu la tradukojn de la nacilingvaj vortoj nur per oficiale konfirmitaj klasikaj Esperantaj vortoj. La aŭtoroj de la nuna vortaro sekvis tiun principon kaj enmetis la uzatajn en Esperanto neologismojn, senkonsidere al ilia kritikebleco. Tamen ili indikis per speciala noto la neologismojn, **kies uzado devas esti malrekomendata**. Kompreneble, tiu ĉi pritakso estas laŭ la subjektiva opinio de la aŭtoroj, respektive de la redaktoro.

4. Ĉu estas aliaj distingiĝaj karakterizajoj de la nova vortaro?

Jes, estas.

Unue. Precizigo de la signifoj. La aŭtoroj evitas la ofte sekvtan sistemon serĉi por ĉiu esperanta vorto nur unu bulgaran adekvatan vorton. La signifa amplekso de unu vorto en iu lingvo ne ĉiam plene koincidas kun la amplekso de la respektiva vorto en alia lingvo. Tio rilatas ankaŭ pri la metafora uzo de iuj vortoj. La aŭtoroj penis limkonturi la enhavon de la Esperantaj vortoj per sinonimoj de la bulgaraj interpretoj.

Due. Kun tia celo ankaŭ apud multaj vortoj la aŭtoroj metis klarigajn ekzemplojn — sekvante la principon, esprimitan en la moto de la franca vortaro Larousse, ke **vortaro sen ekzemploj estas nur skeleto**.

Trie. Pri iuj vortoj, pli speciale pri sciencaj terminoj, nomoj de malsanoj k. a., estas donitaj interkrampe ankaŭ mallongaj klarigoj (sen enciklopediaj detaloj); sen tiaj klarigoj por granda parto de la bulgaraj esperantistoj la donata bulgara vorto ne estus pli komprenebla ol la interpretata Esperanta (ekz. **килсон** килсон).

5. En kia stato estas nun la laboro?

La manuskripto estis preta kaj prezentita en la eldonejon „Nauka i izkustvo“ en la anticipe kontraktita templimo — la 15-an de decembro 1961. La

gvidpersonoj ĉe la Eldonejo tamen ne aprobis ĝin en la prezentita formo kaj redonis ĝin al la aŭtoroj por relaboro laŭ aliaj principoj. Nun la aŭtoroj laboras denove siajn partojn kaj prezentas ilin por kontrolo en la Eldonejon. La templimo por tiu ĉi laboro estas fiksita je la 30-a de novembro 1962. La aŭtoroj jam estas preskaŭ pretaj kun siaj partoj, sed la Eldonejo ne kontrolis la prezentitajn partojn kaj oni ne povas komenci la tajpadon.

6. En kio konsistas la malaprobo de la eldonejo?

Unue. En la amplekso. Ĝi postulas, ke la vortaro ne superu la antaŭviditan en la eldonplano ampleksojn — 25 eldonejaj presfolioj. Konforme al tio la aŭtoroj devas forstrekigi parton de la enhavo de la manuskripto.

Due. La tajpformo de la manuskripto. La eldonejo ne deziras akcepti manuskripton, en kiu la teksto de unu artikolo estas tajpita maldense (en apartaj linioj por ĉiu aparta signifo aŭ ekzemplo), sed sinsekve unu post alia en plena linio. La tuta manuskripto devas esti retajpita.

Trie. La eldonejo trovas, ke por dulingva vortaro ne estas necesaj ekzemploj.

Kvare. Ĝi trovas ankaŭ nenecesaj la donitajn interkrampe klarigojn pri la signifoj de la maloftaj kaj ne vaste konataj bulgaraj vortoj (precipe terminoj). Laŭ la opinio de la gvidpersonoj ĉe la eldonejo, la uzanto de la vortaro serĉu tiajn klarigojn en la specialaj bulgaraj leksikonoj (medicina, teknika ktp.) aŭ en la vortaro de fremdaj vortoj en la bulgara lingvo.

7. Kiel renkontis la aŭtoroj kaj la redaktoro tiujn ĉi postulojn de la eldonejo?

Pro la neceseco malgrandigi la ampleksojn de la vortaro ili akceptis ilin parte — en ia grado, kvankam tio donos al la vortaro alian fizionomion ol la dezirita.

Tio koncernas pleje min — la redaktoron, ĉar nun mi devas kontroli, ĉu la aŭtoroj observis ĉe la relaboro la principojn, kiujn mi mem ne aprobas. Mia unua movo estis rifuzi pluan redaktoran okupon, sed tio minacus la eldonon mem de la vortaro, kiu en la nuna tempo estas treege necesa. Do kompromise mi daŭrigas mian laboron. Mia krea partopreno restos do ne en la arango de la vortaro, sed precipe en la starigo de precizaj interpretoj de la Esperantaj vortoj.

Tamen mi devas diri, ke ankaŭ en la nova formo la vortaro estos bona kaj per ĝi la bulgara Esperanta leksikografio faros grandan puŝon antaŭen.

8. Kiam oni povus atendi, ĉe la montritaj irkonstancoj, la aperon de la vortaro?

Laŭ la intenco de la Eldonejo — en la unua kvarono de 1963.

Abonu al „Bulgara Esperantisto“! Havigu al vi la eldonaĵojn de BEA — „Sub la jugo“ de Ivan Vazov — prezo 1.73 lv. kaj „La mondo havas internacian lingvon“ (en bulgara lingvo) de Ivan Sarafov kaj St. Masárov — prezo 0.50 lv.

75 JAROJ DA ESPERANTO-MOVADO

En la 19-a jarcento la problemoj pri internacia lingvo profunde interesis la popolarajn amasojn. La fundamentoj de tiu internacia lingvo ekgermis en la sino mem de la socio. Nia majstro Zamenhof ellaboris kaj publikigis sian projekton de internacia lingvo bazante sin sur vere internacia lingva materialo. Tio nome certigis la plenan sukceson de la nova lingvo.

La unua lernolibro sub la titolo „Internacia lingvo de Doktoro Esperanto“ aperis en rusa lingvo la 14-an de julio 1887. En la sama jaro aperis eldonoj en pola, franca kaj germana lingvoj.

Komence la lingvo disvastigis pleje inter rusoj kaj poloj. Unuaj esperantistoj estis Borovko, Devjatnin, Grabovski, Postnikov k. a.

Poste la lingvo disvastigis en Germanio. Unuaj esperantistoj tie estis L. Einstein, Ch. Schmidt, W. H. Trompeter. En Nurnbergo estis fondita la unua Esperanto-grupo (1888). Tie aperis ankaŭ la unua Esperanto-gazeto „Esperantisto“ (1889). En 1893 laŭ propono de Zamenhof estis fondita Tutmonda Ligo Esperantista, konsistanta el abonantoj de „Esperantisto“. Post la ĉesigo de „Esperantisto“ en 1895 en Upsala (Svedio) komencis aperi gazeto „Lingvo Internacia“.

Unuaj esperantistoj en Francio estis L. de Baufron, Boirac, C. Burle (Bourlet), P. Frjuiktie (Fruictier), Th. Kar (Cart) k. a.; en Anglio — Bolinbroke Mudie, Ĉefeĉ, Wacril k. a.

La unua lernolibro de Esperanto por bulgaroj estis eldonita en 1889 de Miloslav Bogdanov. Li komencis eldoni ankaŭ Esperanto-bulgaran gazeton „Mondlingvisto“ (1889), de kiu aperis tri numeroj. Post la germanoj kaj la rusoj ankaŭ la bulgaroj fondis en 1889 Esperanto-societon en Sofio, kiu ne vivis tre longe. Post M. Bogdanov aperis novaj esperantistoj: Hr. Popov, G. Oreškov, G. Atanasov, G. Aktargiev, P. Jordanov, Pan. Kolev, At. D. Atanasov k. a., kiuj vigle laboris por la disvastigo de la lingvo en nia lando. Dank' al ili kaj al la pli juna generacio nia enlanda movado estas tre forta.

En 1905 en Bulonjo ĉe Maro (la 5-an de Aŭgusto) okazis la Unua Universala Kongreso de Esperanto. Dum la somero de 1963 okazos en Sofio la 48-a Universala Kongreso.

En 1908 (la 28-an de aprilo) laŭ iniciato de H. Hodler kaj Th. Ruso (Rousseau) oni fondis Universalan Esperanto-Asocion, kiu ludas konsiderindan rolon por la disvastigo de la lingvo en tutmonda skalo.

75 jaroj ne estas longa periodo en la historio de la homaro, sed ili estis sufiĉaj por stabiligi kaj plifirmigi la Esperanto-movadon en la mondo. Nun la lingvo ludas rolon de grava faktoro por la edukado, scienco kaj kulturo, kion agnoskis ankaŭ UNESKO.

Esperanto-sekcio ĉe Centra Kulturdomo de medicinistoj en Moskvo kun granda ĉagreno informas, ke la 13. VI. 1962 mortis malnova esperantisto-inĝeniero Morozov V. F., naskiĝinta en la jaro 1903, estinta sekretario de Moskva Esperanto-organizaĵo, sindonema, fervora aganto por Esperanto dum tuta sia vivo.

Ni esprimas profundan kondolencon al la edzino kaj al la parencoj de la mortinto.

Sekretario:
K. Lavrentiev

Prezidanto de la sekcio:
Salnikov



SESA NACIA KONGRESO DE LA PACO

La Sesa Bulgara Kongreso de la Paco okazinta en Sofio la 11-an de junio 1962 estis granda manifestiĝo de nia bulgara popolo por paco inter la popoloj. Pli ol 600 delegitoj el ĉiuj regionoj de la lando kunvenis en la nacia teatro „Ivan Vazov“ por partopreni en la laboro de la kongreso. Per mallonga parolado la prezidanto de la Bulgara Komitato por Defendo de la Paco akademiano Georgi Naĝakov malfermis la kongreson.

Renkontitaj per tondraj aplaŭdoj en la prezidantaro de la kongreso okupis siajn lokojn reprezentantoj de sovetia, hungara, rumana, itala, afrika, jugoslavia kaj aliaj pacmovadoj.

„La ĝenerala kaj plena malarmado estas noda problemo de la internaciaj rilatoj“, diris akad. G. Naĝakov. Li substrekis ke nun en la mondo ekzistas fortoj kapablaj malebligi la mondan nuklean militon. La ideo por paca solvo de la disputindaj kaj miskomprenaj problemoj inter la ŝtatoj kaj grupoj da ŝtatoj, per ĝenerala kaj plena malarmado, ĉiam pli disvastiĝas en la mondo. En apogo je tiu ĉi ideo dum julio en Moskvo okazos monda kongreso por ĝenerala malarmado kaj paco.

Unu post alia aperas fremdlandaj reprezentantoj kaj salutante la kongreson en la nomo de siaj pacmovadoj, esprimis la volon de siaj popoloj batali por paco en la mondo. La reprezentanto de la sovetia pacmovado F. Riĵenko salutante la kongreson en la nomo de la sovetiaj pacbatalantoj interalie diris: „La movado por paco, por ĝenerala malarmado fariĝis movado ampleksanta la tutan mondon. Tio ĉi tute ne estas hazarda. Por la malarmado, por malebligo de la mondmilito estas interesitaj ĉiuj fortoj de la progreso, ĉiuj homoj de la laboro, de la homoj el ĉiuj profesioj en la nuntempa mondo.“

Por la bruligo de milito, por preparo de nuklea milito, por amasigo de

armiloj estas interesitaj la nuntempaj militemuloj, kiuj ricevas grandajn profitojn de la produktado de mortigantaj armiloj. Cent milionoj da homoj el la grandaĝa loĝantaro en la mondo nun estas okupitaj senpere en la produktado de mortigaj armiloj. Cent miliardoj da dolaroj ĉiujare estas uzataj por armado. Tio kaŝas en si grandan danĝeron. Neeviteble venos momento kiam ili estos aplikataj en milito. Jen kial, devo de ĉiuj homoj sopirantaj la pacon estas ĉesigi la armadon portantan morton al milionoj da homoj.

En la salono eksonis fanfaroj, ekregas plena silento. Sur la scenejo aperas pioniro kaj per viglaj paŝoj ekstaras antaŭ la prezidanto de la kongreso, levas manon por saluto kaj diras.

— Kamarado prezidanto de la kongreso, permesu ke grupo da infanpioniroj salutu la kongreson de la paco.

La prezidanto respondas: „Mi permesas.“

En tiu momento ambaŭflanke de la scenejo aperas grupoj da infanpioniroj kun ruĝaj standardoj kaj ekstaras antaŭ la prezidantaro. Post la salutoj ili disdonas bukedojn da floroj al ĉiuj. Senĉesa eksplodo de aplaŭdoj en la salono. La bildo estas kortuŝa. La infanpioniroj apelacias al la kongreso, al siaj patroj kaj patrinoj gardi la pacon, por ke ili lernu en feliĉo kaj paco.

En la laboro de la kongreso partoprenis ankaŭ la Bulgara Komitato de Mondpaca Esperantista Movado per tri oficialaj delegitoj: C. Murgin, T. Lakova kaj N. Nanov.

Fine la kongreso elektis 17 delegitojn por prezenti la bulgarajn pacbatalantojn en la monda kongreso por malarmado kaj paco en Moskvo. De la kongreso estis akceptita apelacio al la bulgara popolo por defendo de la paco.

N. N.

PROVLECIONO

dediĉita al Jurij Alekseeviĉ Gagarin,
la unua kosmonaŭto en la mondo

Estas notinde, ke la rubriko en gazeto „Bulgara Esperantisto“ — „*Por la kursgvidantoj*“ estas tre bone pripensita kaj samtempe utila kiel por ĉiuj legantoj, tiel ankaŭ por ĉiuj kiuj interesiĝas pri la instruado de Esperanto. Mi opinias, ke tiu ĉi rubriko devas aperi konstante sur la paĝoj de nia organo. Mi petas kaj apelacias, ke la redakcio daŭrigu kaj garantiu la ekzistadon kaj aperadon de tiu ĉi rubriko.

La rubriko „*Por la kursgvidantoj*“ estas necesa por ĉiuj kaj helpos ĉiujn.

Dezirante kaj atendante ekscii la labormanieron de aliaj geïnstruistoj mi kuraĝas paroli al la legantoj pri unu mia leciono, kiun mi instruis antaŭ nelonge en la kurso de la fervojista esperantista societo, okazinta dum tiu ĉi jaro.

Volonte mi akceptis prepari koncizan artikoleon kaj mi estus treege kontenta, se estonte mi legos pri aliaj lecionoj, instruataj laŭ aliaj instrumentoj en nia organo. Mia leciono konsistas el du partoj: preparo kaj plenumo de la leciono.

UNUA PARTO

Por ke unu leciono estu bona, taŭga kaj utila la kursgvidanto devas antaŭ ĉio pripensi kelkajn metodikajn postulojn. Grava momento estas la temo, gramatiko, vortaro kaj hejma laboro. Tiuj ĉi elementoj devas esti taŭge elektitaj.

1. Temo. Mi elektis temon pri la unua homo en la Kosmo — Jurij Alekseeviĉ Gagarin. La forflugo en la Kosmo estis grandega evento por ĉiuj kaj pro tio mi elektis tiun ĉi temon. La titolo de unu leciono, la temo devas esti treege interesa.. Mia celo estis

uzi ĝis nun ne multe uzatajn vortojn: kosmo, kosmonaŭto kosmonaviganto, kosma spaco, kosmoŝipo — alimaniere dirite — mi intencis uzi la vortojn de la nova erao, la kosma erao.

2. Gramatiko. Kiel gramatiko, laŭ mia plano, mi devis uzi (praktiki la uzadon) de kelkaj prepozicioj, ekzemple: sur, en, per, ĉirkaŭ.

Rilate la vortaron mi devis pripensi ne pli ol 20 notindajn vortojn. Mi preparis okulrimedon: portreton de Gagarin.

3. Vortaro.

titolo —

heroo —

kosmo —

kosmonaŭto —

kosmoŝipo —

matematikisto —

bedaŭri —

prelegi, raporti —

preleganto (raportanto) —

antaŭdiri —

flugi —

aernavigisto —

surteriĝi —

terglobo —

jarcento —

socialisma tendaro —

kunvojaĝanto, kunveturanto, kuniranto —

sinonimo —

4. Hejma laboro. Rakonti pri Jurij Gagarin.

DUA PARTO

Deirpunkto.

Mi komencis interparoli kun la gekursanoj pri iu vojaĝo. Sekvis miaj demandoj:

— Ĉu vi ŝatas vojaĝi?

Unuanima respondo: — Jes, ni ŝatas vojaĝi.

Estis demandoj rilate iun vojaĝon sur la tero kaj sur la maro.

La respondoj estis pozitivaj, mallongaj kaj klaraj. Ekzemple:

Mi marŝas sur la strato.

Mi ekskursas en la montaro.

Kiel mi jam diris mi celadis fari ekzercon pri la uzo de iuj prepozicioj.

Kiamaniere, per kio oni vojaĝas en la urbo?

Respondo estas trovita kal taŭga.

Mi skribas sur la nigran tabulon.

Vojaĝi per: tramo, aŭtobuso, taksio, vagonaro, vaporŝipo, aviadilo (samtempe mi klarigas la vortojn).

Por transiri al mia rakonto mi demandas:

— Ĉu oni vojaĝas en aero?

Pozitiva respondo.

Mi montras la portreton de Gagarin kaj anoncas, ke la titolo de nia hodiaŭa leciono estas pri **Jurij Aleksejeviĉ Gagarin**.

Vidintaj la portreton, ĉiuj sin preparis atente aŭskulti. Kompreneble, tiamaniere la atento de la gekursanoj estas kaptita. Mi avertas, ke estas necese skribi la nekonatajn vortojn kaj mi komencas rakonti:

„Jurij Aleksejeviĉ Gagarin estas heroo, kiu forflugis en la kosmo. Li estas la unua kosmonaŭto. Surŝipe li flugis ĉirkaŭ la tero. Kiel knabo li revis vojaĝi en la kosmo. Li tre multe lernis kaj li estis teknikisto kaj matematikisto. Li bedaŭris, ke la tago havas nur 24 horojn. Jes, la tempo ne estis sufiĉa por la malgranda junpioniro Jurij. Kiel lernanto en la teknika lernejo li prelegis pri fiziko kaj diris interalie: „La homaro ne restos ĉiam sur la tero. La homoj konkeros la tutan spacon ĉirkaŭ la suno“. Li ŝatis legi kaj paroli pri K. Ciolkovski — la rusa sciencisto, kiun oni konsideras patro de la kosmonaŭtoj kaj kiu revis pri veturo en la kosmo. Li antaŭdiris, ke la homoj flugos en la kosma spaco.

Gagarin revis ekflugi en la kosmo. Li revis esti aernavigisto, aerkonkeranto kaj li sukcesis. Li flugis ĉirkaŭ la

terglobo kaj surterigis, li denove troviĝis sur la tero. Flugante en la aero ĉirkaŭ la terglobo li tre bone sciis, ke per la kosmoŝipo li portas la grandegajn ideojn de Vladimir Iliĉ Lenin. Gagarin estas filo de la laborista klaso kaj filo de la sovetia popolo. Li estas nuntempa Kolumbo. Li estas heroo kies nomo restos dum jarcentoj. Lia nomo eniros en la historion de la homaro. Gagarin estas fidela filo de la komunista partio, senmorta filo en la socialisma tendaro. Gagarin apartenas al laborista familio.

Oni ĉiam rememoros ankoraŭ pri du „personoj“ — kunvojaĝantoj, kunveturantoj, kunirantoj de Gagarin — hundoj Strelka kaj Belka.“

Post la rakonto sekvis konversacio. Mi demandis:

— Kiu estas la unua homo, kiu vojaĝis en la kosmo?

Per tuta frazo oni bone respondis:— Jurij Gagarin estas la unua kosmonaŭto.

— Kiu estis matematikisto?

— Jurij Gagarin estis ankaŭ matematikisto.

— Kiamaniere li ekflugis en la kosma spaco?

— Jurij Gagarin ekflugis kun kosmoŝipo „Vostok“ en la kosma spaco.

— Kiu estas la patro de la kosmonaŭtoj?

— Konstantin Ciolkovski estas la patro de la kosmonaŭtoj.

— Ĉu Jurij Gagarin estas nia nuntempa Kolumbo?

Per korekta kaj plena frazo oni pozitive respondis ktp.

Tiamaniere ni parolis pri Gagarin. Ĉiuj partoprenis la konversacion. Mi sukcesis paroligi ilin — kaj la celo estis atingita. La leciono finiĝis. Mi kontrolis la horlogon. Jam la tempo pasis.

Kiel hejman laboron mi donis la jenan taskon: „Rakontu pri Jurij Gagarin“.

Mi salutis la gekursanojn kaj ni disigis.

P. Ĉakova-Georgreva

Siberio! La lando de diamantoj kaj oro, karbo kaj fero, abundaj rikoltoj, grandegaj arbaraj riĉaĵoj, la regiono de novaj uzinoj kaj fabrikoj, elektrostacioj, sciencaj institutoj, altlernejoj — jen estas la signifo de Siberio, de la lando de vigla, kreanta vivo.

Tia estas Siberio por ĉiu siberiano, por ĉiu sovetiano, kaj estas tial tre ofendinde kaj samtempe ridinde legi eksterlandajn leterojn kun vere naivaj demandoj pri nia Siberio. Tra linioj de kelkaj leteroj estas legeblaj stultenaivaj demandoj: „Ĉu marŝas ur-oj sur stratoj de siberiaj urboj kaj vilaĝoj?“. Jen estas citaĵo el la letero de samideanino A. V. el Jiugoslavio: „La nomo Siberio havas ĉe ni la signifon (mi volas diri, ke kiam ni parolas pri Siberio, ni tiel imagas) de grandegaj landoj eterne sub neĝo. Ni neniel povas imagi viajn ebenaĵojn kovritajn per herbo, nur per dika kaj blanka neĝa kovrilo. Kompreneble, mi scias, ke tio ne estas vera, ke ankaŭ vi havas urbojn, verdajn parkojn kun floroj.“

Jes, estimata samideanino, jes, estimataj gesamideanoj, estas en Siberio ankaŭ urboj. Siberio havas pli ol 20 urbojn kun pli ol 100-mila loĝantaro, inter kiuj, ekzemple Novosibirsk havas pli ol 880 miloj da loĝantoj, Omsk — pli ol 580 miloj ktp.

Kaj sur iliaj stratoj iradas laboristoj, ofi-cistoj, inĝenieroj, instruistoj, scienculoj, studentoj kaj multaj aliaj profesianoj.

En Siberio funkciadas 70 altlernejoj. En ilia nombro estas kvar universitatoj, institutoj, teknikaj kaj agrikulturaj, pedagogiaj kaj medicinaj k. a. La universitato en urbo Tomsk estas fondita en 1888.

La kultura kaj la scienca centro de Siberio estas Novosibirsk. En ĝi funkciadas 12 altlernejoj: universitato, konservatorio ka. La Siberia filio de Sovetunia Scienca Akademio, kiu situas en Novosibirsk, estas gvidata de mondfamaj scienculoj-akademianoj. Ĝi havas nur en la urbo ĉirkaŭ 20 sciencajn esplorajn institutojn.

Unuigo de siberiaj verkistoj eldonadas tut-siberian literaturan gazeton „Siberiaj fajroj“.

Novosibirska teatro de opero kaj baletoj estas unu el la plej grandaj kaj la plej bonaj operaj teatroj en Sovetio. Multaj teatroj dramaj, muzikaj, operetaj, sennombraj kinejoj kaj kluboj, librovendejoj, lernejoj — ĉu estas eble ĉion nomi!

Ĉiuj grandaj siberiaj urboj havas unu aŭ kelkajn teatrojn, ĉiutage siberianoj multloke ŝaltas televidilojn, fabrikatajn do en Suberio.

Nord-orienta parto de Siberio — Jakutio — estas loĝata de malgranda jakuta popolo, kiu antaŭ la Oktobra Revolucio estis la plej malriĉa, malsata kaj malklera popolo en carisma

Rusio. Nun jakutoj havas sian nacian muzikdraman teatron, universitaton, kiu pretigas por la respubliko instruistojn, inĝenierojn, kura-cistojn, agronomojn kaj aliajn diversajn specialistojn.

En Siberio mankas urboj sen fabrikoj aŭ uzinoj.

Jes, dum vintro niaj ebenaĵoj, montaroj, arbaroj, niaj stratoj kaj parkoj estas kovritaj per blanka neĝo. Sed ĉu dum vintro teritorio, ekzemple, de Skandinavio ne estas kovrita per neĝo? Vere, niaj siberiaj vintroj estas pli severaj ol en aliaj lokoj.

Tamen ĉu vi scias, ke en Orienta Siberio estas tiom da sunaj tagoj, kiom estas en Italio, kaj vintre oni vidas sunon pli ol en Krimeo.

Siberia vintro estas ne tiel terura, kiel oni opinias eksterlande. Mi mem ne estas naskita siberiano, tial kedu min!

Dum mallonga, sed varma kaj suna somero siberianoj sunbruniĝas sur bordoj de riveroj kaj lagoj.

Grandega estas Siberio. Sur ĝia teritorio povus dislokiĝi Usono (sen Aljasko), Britio, Francio, Italio, Germanio kune prenataj. Cervo en nordo kaj kamelo en sudo — jen estas la diapazono de la kultura faŭno siberia. Kiom da belegaj naturaj lokoj estas tie ĉi, egaj riveroj, lagoj!

Belega Bajkal (en Orienta Siberio) estas la plej profunda lago en la mondo. Ĝi miregigas imagon per siaj amplekso, multakveco, majesteco de severa naturo.

Unu el la plej belaj lokoj en Siberio estas Altaĵo, la duparta — stepa kaj montara — regiono, kies ĉefa urbo estas 330-mila Barnaul, granda kultura kaj industria centro de Siberio.

Tra centaj kilometroj dislokiĝas belegaj arbaroj de Altaĵo; ĉi tie estas beluloj — cembroj, parkaj arbaroj de pinoj, piceoj, larikoj kaj abioj.

Malsupre de la neĝoj kaj supre de la arbaroj Altaĵaj montoj estas kovritaj per famaj montaraj herbejoj; montaraj floroj miregigas tie ĉi per sia grandeco kaj hela koloroj, kaj herboj posedas neordinarajn furaĝajn ecojn. La milojn da gregoj de ŝafoj, kaproj kaj kornhavaĵoj brutoj nutras la abundaj herboj. Multaj turistoj vizitas ĉiujare montaron Altaĵo kaj precipe ĝian belan lagon Teleckoje Ozero.

Ne, ne estas eble per malgranda rakonto ĉion priskribi, ĉar Siberio estas granda, kaj la vivo en ĝi estas senlime diversflanka, interesa, vigla.

Vizitu Siberion kaj vi mem konvinkigos je tio.

Inĝ. Azarij Perelman, Barnaul,
Altaĵo, Siberio, USSR

PAZARĜIK. Dum junio gastis al ni k-do Dimitar Ivanov el Plovdiv. Li rakontis kiamaniere li sukcesis kolekti membrokoton de 192 esperantistoj plovdivanoj, 138 diversajn abonojn por gazetoj. Modesta kaj fervora esperantisto li estas imitinda ekzemplo ankaŭ en la kampanjo por disvolvado de la markoj-brikoj por Esperanto-domo.

Nia societo elektis siajn delegitojn por la 35-a Kongreso de BEA en Burgas. Pli ol 80 membroj pagis ĝis nun sian membrokoton kaj 26 pazargikaj esperantistoj senpacience atendas la tagojn de la kongreso.

R. Georgieva

LOVEĈ. En la stacidomo de Loveĉ estas 15 novaj esperantistoj. Ili estas laboristoj kaj oficistoj kaj malgraŭ kiel fervojistoj ili estas okupataj ĉu tage, ĉu nokte, ili regule partoprenas la kurson kaj diligente lernas. Krome, kiam la ĉefo de la stacidomo alvokis ĉiujn esperantistojn helpi la kooperativanojn en la fosado de la maizo ili tuj forveturis al la kampoj de vilaĝo Prodimĉec. Dum tri tagoj ili trafos 75 dekarojn da maizo, Tre bone laboris Iv. Stojĉev, Iv. Jotev. N. Monĉev kaj aliaj esperantistoj.

Kina Uzunova, v Umarevci

PERNIK. Ek de unu monato nia societo havas klubejon, situanta sur strato „Agoin“. Ĉiulunde ni havas kunvenon por praktiki la lingvon. La 18-an de junio k-do N. Mitev prelegis je temo: „La 14-a Internacia Fervojista Esperantista Kongreso en Budapeŝto kaj impresoj el frata Hungarujo“. Ĉiuj ĉeestantoj estis impreigitaj de la kongresaj materialoj kaj de la bildoj el la kongreso.

Nun la societa estraro preparas proponon al ĉiuj partiaj organizaĵoj en Pernik por kunlaboro kaj helpo ĉe malfermo de esperantaj kursoj en la entreprenoj.

Okaze de la ĉi-somera landa kongreso, ĉiuj societanoj pagis sian membrokoton por la tuta jaro kaj societo nun nombras 50 membrojn.

N. Mitev

PLOVDIV. Okaze de la 35-a Kongreso de BEA, la Esp.-societo „Kuituro“ kune kun la junulara grupo ĉe la societo organizis dum majo du labortagojn en la urba parko. Tie laŭ kontrakto inter la societo kaj la entrepreno prizorganta la urbajn parkojn en Plovdiv, „kulturanjo“ konstante zorgos por 50-dekara tersurfaco de la granda parko ĉe la bordoj de rivero Marica, kiu estas nomita de ni „Esperanto-parkanguleto“.

En la unua labortago partoprenis 19 gekaŭaradoj kaj en la dua — 23, plejparte geju-

nuloj. Dum la laboro formiĝis grupetoj inter kiuj ekflamis amika konkurado. Gajnis la plej vigla, gaja kaj laborema junula grupeto de kamaradoj: Iv. Ignatov, Lil. Dimitrova, P. Jordanova kaj Sarkis Arsenjan. Al la sama grupeto ni donis la fruntan lokon en nia esperantista kolumno dum la manifestacio, la 24-an de majo-tutpopola festo de klerigo kaj kulturo.

Je la fino de la labortagoj, la parkĝardenista inĝeniero St. Kovaĉev pritaksis la laboron de la esperantistoj kiel altrezultan kaj kore dankis al ni. En la posttagmezo, kontentaj pro la sukcesa laboro, la junuloj komencis amuzajn, ludojn kaj banadon en la rivero.

Dum la sekvontaj monatoj ni organizos ankoraŭ pli amasajn labortagojn kaj sub niaj konstantaj zorgoj la Esperanto-anguleto en la granda urba parko ĉiam estos bonaspekta kaj alloga loko por la geurbanoj dum iliaj ripozhoroj.

**N. Samarov
J. Angelov.**

VRACA. La 24-an de majo la lernantoj el la du esperantaj kursoj en la teksta teknikumo, gvidataj de E. Daskalov — instruisto kaj Kost. Ivanov — lernanto, denove partoprenis la manifestacion ĉefrante kun la esperantista standardo portata de unu el la plej fervoraj esperantistoj — A. Petrov. Sekvis granda surskribo „ESPERANTO“ kaj speciala ligna portilo kun 80 esperantistaj libroj kaj gazetoj el la tuta mondo, ordigitaj sur ĝi. Ĉiuj estas ĝojaj pro la festo. Venontjare ili povos partopreni ankaŭ kurson por progresintoj.

E. Daskalov

Burgas. La geesperantistoj en urbo Burgas regule ĉiumerkrede ekde 19 horo kunvenas en la klubejo de la societo.

La kunvenojn ni faras laŭ la kvarmonata plano. En ĝi estas fiksita la tagordo de ĉiu kunveno.

La plano por la unua kvarmonato estis plenumita. Funkciis du kursoj por komencantoj, gviditaj de K. Limonov kaj J. Stanimirova, Paralele kun tio dum regulaj kunvenoj ĉiumerkrede funkciis ŝnpera kurso por lingva perfektado, gvidata de K. Konstantinov, K. Limonov kaj J. Stanimirova. Ĉiuj kursoj, organizaj kaj kulturklerigaj kunvenoj pasis je alta nivelo.

Dum la unua kvarmonato estis faritaj ankaŭ tre interesaj raportoj: K. Konstantinov — „3-a de marto — la tago de nia liberigo el turka jugo“, J. Stanimirova — „La 8-a de marto — la internacia tago de la virinoj“, K. Konstantinov — „Rememoroj el la batalo

de progresemaj esperantistoj kontraŭ la faŝisma diktaturo*, B. Golemanov — „Scienco kaj religio“, P. Ganiŝev — „La balotoj kaj nia partopreno en ili“.

Laŭ la dua kvarmonata plano plej grava tasko estis la preparo de la 35-a bulgara esperanta kongreso.

Paralele kun la snpera kurso la plano enhavas ankaŭ tre interesajn raportojn kiel: „24-a de majo — la tago de la slava skribaĵo kaj kulturo“ de J. Stanimirvva, „Dua de junio — la tago de la pereintoj en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo“ de B. Golemanov, „80 jaroj de la naskiĝo de la gvidanto de nia popolo G. Dimitrov“ de A. Čalakov, „La interesaj de nia urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo“ de P. Ganiŝev kaj multaj aliaj.

Malgraŭ tio en ĉiu kulturkleriga aŭ organiza kunveno ni diskutas la taskojn pri preparado de antaŭstaranta 35-a esperanta kongreso.

La societa estraro, Lo-Ko-Ko kaj ĉiu esperantisto el la urbo ĉiutage pensas kaj laboras por la plej bona preparo de la kongreso.

P. Ganiŝev

Gasto de Burgasaj geesperantistoj estis Georgi Dimov — prezidanto de Esperanta societo „Albato“ en Varna kaj membro de CK de BEA.

En du societaj kunvenoj li faris prelegojn pri la okazonta 47-a internacia kongreso en Kopenhago kaj la antaŭstarantaj taskoj konekse kun la 35-a kongreso de la bulgaraj geesperantistoj, okazonta en nia urbo.

Post la raportoj oni aŭskultis alportitajn de k-do G. Dimov gramofondiskojn: „La natura valoro de internacia lingvo“ de D-ro Ivo Lapenna kaj surbendigita programo de Varnaj esperantistoj pri „24-a de majo — la tago de la slava skribaĵo kaj kulturo“.

Burgasaj geesperantistoj tre dankas al k-do G. Dimov pro la faritaj prelegoj.

Jambol. La geesperantistoj de Jambol ĉiam aktive partoprenas la tuturbajn iniciatojn. Kiam dimanĉe centoj da laboruloj helpas la agrikulturistojn en la urĝaj someraj laboroj, la esperantistoj ankaŭ ne forestis.

Frue matene, je la 10-a de junio granda grupo da junuloj direktiĝis kun bruo kaj ridoj al la kampoj de la ŝtata agrikultura mastro. Malgraŭ la malbona vetero, la junuloj laboris dum la tuta tago. Inter la plej fervoraj estis A. Dimitrov, St. Dimitrov, N. Dimitrova, Kr. Naskinova, M. Stojanov, Zdr. Ivanova, J. Dimitrova, M. Teneva kaj multaj aliaj. La freŝa kampara aero, la bongusta komuna

fagmanĝo, la fotografiĝoj kaj la gajaj ridoj plinuigis la junularan esperantistan kolektivon.

Petja Kračeva

Ruse. La societo „Libero“ organizis vendrede vespere, la 31-an de majo, kunvenon en la klubejo de la kulturaj agantoj. Dank' al afabla disponigo de ilia salono ebligis ankaŭ projekcio de la filmo „Nesebār“. K-do Kosta Conev prelegis pri Hr. Botev kaj la pereintaj batalantoj por nia liberigo. K-do J. Kalinov informis pri la komencita kunlaborado kun la estraro de la klubo de la kulturaj agantoj, kies prezidanto — k-do Černjakov — opinias, ke la loko de la esperantistoj, same kulturaj agantoj, kiuj per sia korespondado kaj internaciaj rilatoj kontribuas al popularigo de la bulgara kulturo, ankaŭ estas en la klubo. Post la kunveno membroj el la estraro de ambaŭ organizaĵoj kunsidis por interŝanĝi opiniojn kaj konkrete pridiskuti la estontan kunlaboradon. Sendube tiu ĉi komuna agado estos tre utila.

Boris Kavalĝiev

Sevlievo. Bela estis la vespero de la 16-a de majo. Antaŭ la pordo de la esperantista klubejo la preterpasantoj scivoleme enrigardadis aŭdinte nekonatan parolon kaj kantojn. Ĉi-vespere nia societo aranĝis „Vesperon de la originala esperanta literaturo“. La vesperon malfermis la pioniroj el la esperantista rondo

„Ne militon volas ni,
pacon nur deziras ni.
En la granda, granda mondo,
nia kamarado“.

kantis la infanoj kaj ĉiuj varme aklamis ilin.

Koncizan prelegon pri la esperanta literaturo legis k-do Iv. Georgiev. Li substrekis, ke la esperanta literaturo sekvas la naturan evoluon de ĉiu alia literaturo kaj precipe la poezio jam rivalas al multaj naciaj. Pioniroj kaj lernantoj recitis versaĵojn de D. Stanev, L. Jevsejeva, M. Ljubin (As. Grigorov), S. Karolčik (Karolczyk), J. Bogi (Baghy), N. Hohlov, L. C. Deij, P. Torsen, M. Boulton (Boulton), W. Old (Auld) kaj I. Georgiev. K-dino B. Mandeva tra legis kortuŝan originalan rakonton — „La gravurita bastono“ de Martin Benka el Ĉeĥoslovakio.

La geesperantistoj disiris kontentaj, kunportante en si la melodion de la belsona esperanta lingvo kaj la konvinkon, ke similaj vesperoj estas tre utilaj kaj ofte oni devus aranĝi ilin.

Bonka Mandeva

Sofio. La esperantistoj en Sofio konstante disvolvas viglan kulturklerigan kaj socian agadon. En la salono sur bulv. D. Blagoev ĉiulunde kunvenas pli ol 80-100 personoj.

La 7-an de majo okazis vespero pri lingvaj demandoj kaj tute speciale pri la esperanta stilo. Inter alie oni legis opiniojn de elstaraj esperantistoj — K. Kaloĉaj, I. Lapenna k. a.

La 14-an de majo N. Nikolov — vicprezidanto de la societo, raportis pri la nova projekto-programo de UEA. Post la diskutoj estis elektita komisiono, kiu pripensu la problemojn pli atente kaj detale kaj sendu la rekomendojn al la estraro de UEA.

La 21-an de majo la sekretario de BEA V. Oljanov raportis pri la internacia fervojista kongreso en Budapeŝto. Li rakontis pri siaj renkontoj kun K. Kaloĉaj kaj Ivan Sergejev

el Sovetunio. Grandan entuziasmon provokis la sciigo pri baldaŭ atendata fondo de Sovetia esperantista asocio.

La 28-an de majo okazis solena kunveno-celebrado pri la legendeca bulgara revoluciulo kaj genia poeto Hristo Botev kaj la falintaj herooj en la batalo kontraŭ la faŝismo. At. Lakov legis raporton: „Ili pereis por liberigo de sia popolo“.


La 4-an de junio okazis belega amuzvespero kun varia programo. Ĝis malfrua horo oni dancis kaj amuziĝis.

La 11-an de junio N. Nikolov kaj L. Mladenov raportis pri la necesaj iniciatoj por finkonstruo de la montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝa. Oni faris multajn utilajn proponojn, kies realigo sendube donos novan puŝon al la afero. En la kunveno oni kolektis novajn 150 levojn por la montodomo.

N. Nanov

NIA KONKURSO

Problemo N 2



Mato en 2 movoj

Kontrolo:

Bl: Rd8, Dh4, Td1, Ĉa5, c4, Kd4, h1
p: d7, f4

Ni: Rd4, Dd2, Tc1, Ĉc3
p: b5, f5, g7

Solvojn sendu al la Redakcio ĝis la 30-a de septembro.

Ĝustan solvon (Kd4-f6) de problemo № 1 ni ricevis de Ericas Laiconas el Kaŭnas, Litova SSR, Nikola Ivanov el Sofia, K. Hlebarov el Petriĉ kaj Minĉo Daskalov el Nova Zagora. Ni dankas.

Rim. Ni pardonpetas pro la prezeraroj en nia unua rubriko:
aloko anstataŭ aroko
oficiro anstataŭ kavaliro
— ŝakminaco anstataŭ + minaco al la Reĝo

Ĉefredaktoro: Violin OLJANOV

Redakta komitato: Kiril DRAĴEV, Atanas LAKOV, Canko MURGIN (vicĉefredaktore),
Ivan SARAFOV, Simeon SIMEONOV.

Korektis: Ivan Sarafov

Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66. Tel. 7-46-01

DEZIRAS KORESPONDI

USSR

Vladimir Kurguzov, ul. Sosnovaj 34 kv. 4, Jalta Krimeo

Vladimir Ĉernov, per. Ŝkolnij 26, st. Ĝambul, Kazahstan — kun gejunuloj el ĉi per PK Leonid Kočukov (studento, 15-jara). Hutor Marickij (Sevskij r-n, Brjanskaja obl.) — kun samaĝuloj el Bulgario kaj aliaj landoj pri literaturo, naturbelajoj; L, PK, PM.

Evgenij Glagolev (studento de geologio, 22-jara), str. 8 Marto 82 543, Sverdlovsk, Uralo — kun bulgaraj studentoj de geologio pri mineralogio, filatelo, desegno-arto.

POLLANDO

Danuta Nowak (16-jara), ul. Dekerta 5, Sosnowiec — kun Bulgario pri filatelo, kino-arto; PI.

Du 15-jaraj lernantoj el Kroskienko n/D (voj. Krakow, pow. Nowy Targ): 1) Jan Morawczynski, ul. Jagiellonska 90, 2) Marian Woicki, ul. Mickiewicza 53 — kun bulgaraj lernantoj; PM.

Wieslaw Weszczak, Sadoksyce 13 (p-ta Charlupia-W., pow. Sieradz, woj. Lodz) — kun

junuloj el Bulgario pri sporto, literaturo, filmo; PI, PM.

N. Klodas, Pabianice, Orla 40, sola sinjorino, deziras korespondi kun similaj samideanoj.

HUNGARIO

Šandor Termes, Vendel-u. 34, Budapest IX — kolektas materialojn por la Historia Instituto kaj la Muzeo de la liberigaj bataloj de Hungario (1944—45), kiujn partoprenis Unua Bulgara Armeo. Sendu rememorojn, fotografaĵojn, flugfoliojn, dokumentojn, mapojn, librojn.

Ladislau Kóvesdi, str. Guávteler XV ép II em 4a, Dunakeszi — kun gejunulinoj (16—17 jaraĝaj).

RUMANIO

Du junuloj: 1) Zoltan Silimon (instruisto, 22-jara); 2) Rozalia Rigó (instruistino, 23-jara) — str. Ghenciului 20, Carei — kun junuloj el Bulgario.

Ing. Onoriu Puia, st. Basarabi, Bloc, Sc. G. Ap. 4, Ploiesti — kun bulgaroj.

BRITLANDO

S-ro David Gwynn Thomas (instruisto, 38-jara), 18 Coleman Road, Leicester (Leics.) — kun bulgaroj pri turismo; libroj, PM, PI.

Излезе от печат

УЧЕБНИК ПО ЕСПЕРАНТО

от Иван Сарафов и Симеон Хесапчиев

III издание

Цена 0,57 лв.

Поръчки до Българската есперантска кооперация,

бул. Витоша № 40, София, и в книжарниците

на ДТП „Печатни произведения“ в провинцията.